

A

Max ABEGG

*1937. Loĝas en Wallisellen ZH



A. vizitis la komercan altlernejon en St. Gallen, licenciĝis pri ekonomiko (lic.oec. HSG 1961), laboris kiel komerca direktoro en zurika konstru-entrepreno.

A. lernis Eon en 1953 en Neuchâtel kaj estis kunfondanto de Eo-Junularo de Svislando (EJS, 1957), kie li plenumis la taskojn de ĝia kasisto, prezidanto kaj redaktoro de *La Juna Voĉo* (ĝis 1960). Kiel kursgvidanto kaj komitatano de la CK de SES inter 1954 kaj 1959 A. apartenis ankaŭ al la fondaj membroj de Eo-Edukistaro de Svislando (EES) en 1958. Kvankam depost 1962 la dumviva membro de UEA ne plu aktivis en la svisa Eo-movado, li daŭre estas ligita kun UEA kiel ĝia fakdelegito pri entreprena ekonomio.

→Junularo

ADELBODEN

→Berno →Junularo

Anita ALTHERR-PERIČ

*1928. Loĝas en Trieste (Italio)



Sloven-devena italino el Triesto kun itala kaj svisa ŝtatanecoj, vivinta 17 jarojn en Svislando - en Zuriko (1959-63) kaj Ĝenevo (1963-76). Tie ŝi estis konata sub la nomo Masé, pro la nomo de ŝia unua edzo. A. profesie laboris en peltfirmaoj de Zuriko kaj Ĝenevo. Pro sia sindediĉo al ekologiaj, naturdefendaj, vegetaranaj kaj bestprotektaj aferoj A. finfine rezignis pri tiu profesio.

A. lernis Eon en 1951 en Triesto sub la impreso de la itala faŝismo kaj postmilita naciismo, kiu skeptike rigardis al la slovena nacieco, kaj pro la konscio, ke Eo egalrajte traktas la homojn sur sama nivelo. Multajn jarojn ŝi aktivis en la zurika ES kaj ĝeneva EG La Stelo kiel prezidantino, sekretariino, instruistino, redaktoro de *ESZ-Gazeteto* resp. *Brasikfolio* kaj kiel UEA-delegitino. De 1979 ŝi estas diplomita Cseh-instruistino de la Internacia Eo-Instituto en Hago. A. membris en dudeko da Eo-organizoj, partoprenis sennombrajn Eo-aranĝojn, kiujn ŝi regule dokumentis per fotado, kaj aktivis ankaŭ arte: en Svislando ŝi vivigis la Eo-vivon per kantado, teatradado kaj skeĉoj. En Italio ŝi starigis la Triestan Teatran Trupon kaj ekde 1981 aktivis en Triesta EG kiel Eo-instruistino, prezidantino, redaktoro kaj kiel membro de la Itala Katedro de Eo. Konata A. iĝis ankaŭ pro sia dokumenta verko pri la problemaro de la slovena malplimulto en Italio, *Ne facilas esti... sloveno en Italio* (IKEL, Eschweiler 1991). Ankaŭ ŝiaj edzo *Hans A.* (*1914) kaj la filino *Zora Masé* (*1955, loĝanta en Onex/GE) estas Eo-parolantoj.

→Ĝenevo →Zuriko



APPENZELL

Kantono en orienta Svislando germanlingva, dividita en du t.n. duonkantonoj: Ekstera parto (germanlingve: Ausserrhoden, mallong. AR, 243 km², 52'800 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Herisau); Interna parto (germanlingve: Innerrhoden, mallong: AI, 172,5 km², 15'100 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Appenzell.

Disigita inter katolika kaj protestanta partoj, A. estas unu el tiuj geografie iom izolitaj svisaj regionoj, kie la Eo-movado estis ĉiam tre malforta kaj hodiaŭ neekzistanta. La 11a nomaro de la e-istoj de septembro 1904, publikigita en *Svisa Espero*, listigis la juriston Heinrich Volkart, la 12a nomaro (decembro) notis s-ron V. Altherr de la svisa blindula centro, la 16a nomaro en 1905 menciis la instruiston Jakob Brülisauer. Biografiaj detaloj pri tiuj personoj ne ekzistas. Fine de 1907 SES havis kvar appenzelajn (aŭ: apenzelajn) adresojn. En tiu jaro fondiĝis EG en *Trogen*, kie en la Pestalozzi-vilaĝo Gottfried Kuhn (1870-1964) el Zuriko sukcesis aranĝi Eo-kursojn. La revuo *Esperanto* (UEA), n-ro 11/1923, raportis pri la fondo de EG en *Herisau* – ĉi tiu EG ankoraŭ ekzistis en 1944. Inter la ĉefaj surlokaj aktivuloj estas menciindaj *Eduard Graf* (+1973) kaj *Helene Rietmann* (1898-1972). La ĉi-lastata iam estis estrino de la telefon-oficejo en Herisau. Ŝi fariĝis e-istino post kursoj de Andreo Cseh kaj Tiberio Morariu por aliĝi kiel fidele membrino de la EG Herisau dum pli ol 40 jaroj. Samtempe ŝi membris en SES kaj UEA, kies delegito ŝi estis en sia loĝloko en la 1950/60aj jaroj.

En 1947 Julia Isbrücker, konata nederlanda e-istino el Hago, instruis Eon en la Pestalozzi-infanvilaĝo en Trogen/AR.

Kiel UEA-delegito en Urnäsch/AR estis reprezentita ekde 1963 la pastro →*Wilhelm-Flammer* (1909-77).

Regionaj kunvenoj de SES okazis en Herisau en la jaroj 1944, 1947, 1949, 1953, 1958 kaj 1961, evidente temas pri la plej aktivaj Eo-periodoj en tiu regiono.

Guido APPIUS

*1933. Loĝas en Basel



Emerita instruisto devena el orienta Svislando, kiu fakiĝis en la instruista seminario de Rorschach/SG kaj laboris en tiu profesio de 1953 ĝis 1993. Kiel ano de la kristan-demokrata popolpartio, kiel aktiva katoliko kaj kiel deputito en la kantona parlamento en Bazelo (1980-92) A. okupiĝis pri la problemoj de la maljunuloj, pri leĝofarado kaj misuzo de la genera teknologio. Kiel prezidanto de la superpartia komitato 'Por home digna generado' li lanĉis kaj sukcese gvidis la politikan iniciativon pri la protektado de la homo kontraŭ manipuloj en la genera teknologio (en 1994 la svisaj voĉdonintoj konsentis pri ĉi tiu iniciativo). Krome A. engaĝiĝis por la reformo de la germana ortografio (modera minuskligo) kaj redaktis la kvartalan informilon *impuls* en Bazelo (1971-80).

Kiel e-isto de 1989, membro de la bazela ES, SES kaj IKUE, A. sendadis petleterojn al Vatikano, por ke la papo uzu ankaŭ Eon por siaj publikaj paskaj kaj kristnaskaj mesaĝoj (aliaj e-istoj faris la samon; en 1994 Johano Paŭlo II. fakte komencis mesaĝi siajn salutojn en Eo!). Krom tio A. iniciatis broŝuron pri la svisa sanktulo Niklaus von Flüe (1417-87), ĝia Eo-eldono estis tradukita de →Claude Piron.

→Bazelo →Kristanoj →Politiko



ARGOVIO

Kantono en norda, germanlingva Svislando (germanlingve: Aargau, mallong. AG: 1404 km², 569'300 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Aarau. (La toponimo Argovio mankas en PIV, kvankam ĝia uzo en Svislando estas kutima).

Svisa Espero raportis fine de 1905, ke iu J. Wyler, sekretario de la komercista societo, enkondukis Eon en sian organizon kaj gvidis kurson. La postan jaron →Edmond Privat kaj →Friedrich Schneeberger prelegis en la Societo de la junaj komercistoj en Aarau. En 1907 fondiĝis laborista EG en *Baden*, kies gvidantoj, kiuj estis dungitoj de la komerca konzerno BBC, okazigis Eo-kurson por teknikistoj kaj komercistoj de sia entrepreno. →Karl Jost el Zuriko helpis la junan societon per kursgvidado. En 1909 la berna Eopioniro →Jakob Schmid prelegis en la komercista asocio en Rheinfelden, →Friedrich Uhlmann en Zofingen. La 3an de decembro 1910 Schmid prelegis en Wettingen antaŭ 100 studentoj kaj profesoroj de la seminarieja direkcio. Laŭ *Vespera Horo*, n-ro 7/1910, en *Zofingen* formiĝis EG sub la gvido de J. Bloch. La revuo *Esperanto* de UEA, n-ro 6/1923, raportis pri la fondo de *EG Baden* kun Alfred Elgg kiel prezidanto. La postkongreso de la 31a UK en Berno (1939) okazis en Herzberg/AG.

En 1957 okazis Eo-kursoj en la komercaj lernejoj de Aarau kaj Baden. En la 1960aj jaroj aperis →*Paul Bächli* (1901-95), kiu verve agadis por la svisa Eo-movado de 1960 ĝis 1978 kaj kiu estis fakdelegito de UEA pri asekurado en Ennetbaden. Krom Bächli, ankaŭ →*Hans Hunkeler* (1920-2000), komercisto kaj trajnestro en Aarau, UEA-delegito ekde 1956, dediĉis grandan parton de sia libera tempo al la Eo-agado, precipe sur la kampo de la varbado. →*Ernst Glättli* (*1924), kiu loĝas en Brugg, aktivadis seninterrompe, unuavice en la fervojista Eo-movado, ĝis la malfondo de SAEF en 2004. En 1957 ekloĝis en Döttingen →*Friedrich Bierhoff* (1886-1988), kie li oficis kiel UEA-delegito dum la 1960-80aj jaroj. Kun siaj 102 jaroj li estis la plej maljuna e-isto iam vivinta en Svislando. La ĝenerala kunveno de SES okazis en 1910, 1937, 1957 kaj 1968 en Aarau kaj en 1978 en Baden.



Argoviaj esperantistoj: Paul Bächli, Hans Hunkeler, Ernst Glättli

B

Paul BÄCHLI
1901-1995




B. estis argovia instruisto, kiu transiris al la industrio, kie li okupis diversajn komercistajn postenojn.

Fone de siaj konoj de la latina lingvo B. lernis Eon en 1960. En la svisa movado li aktivis de 1960 ĝis 1978 kiel Eo-instruisto en la komerca lernejo en Wohlen/AG, kiel asesoro kaj kasisto de SES (1978) kaj kiel kunredaktoro de *SER* (1973-76 kaj 1978-79). Li prizorgis la dokumentan servon de SES, redaktante du germanlingvajn propagando-broŝurojn por SES (*Was ist Eo?* kaj *Die zweite Sprache für alle*) kaj kunlaboris kun la organizantoj de Eŭropa Ferio-Semajno (EFS) de SAEF, kie li gvidis la Eo-kursojn kaj aranĝis la vesperajn prezentojn (1970-77). B. estis fakdelegito de UEA pri asekurado en Ennetbaden/AG. Pro siaj meritoj li estis elektita honora membro de SES.

→Argovio →Fervojistoj

Alfred BADER
1889-1968



B. estis kuracisto, kiu studis oftalmologion en Bazelo kaj Würzburg kaj doktoriĝis en 1915. Dum la unua mondmilito li deĵoris en la militaj lazaretoj de Germanio kaj poste laboris kiel okulkuracisto, unue en Schaffhausen kaj pli malfrue en sia naskiĝurbo Bazelo (Aeschenplatz, angulo Dufourstrasse).

Lerninte Eon en 1904/05 sub la influo de →Friedrich Schneeberger, B. fondis en tiuj jaroj kun Fritz Wenk k.a. la bazelan EK, kiun li prezidis dum multaj jaroj. La unua mondmilito kaj lia profesia okupo en Schaffhausen, kiu daŭris ĝis 1929, interrompis lian Eo-aktivadon. En 1942 li reaperis en la Eo-movado kaj dediĉis sin al Eo-tradukoj de *Imenlago* de Theodor Storm kaj *Maruška* de Mela Escherich; ĉi tiuj verkoj estis publikigitaj sub la titolo *Du amosentaj noveloj* (1945). B. komencis traduki ankaŭ la verkon *Ĉe la sanktaj akvoj* de J.C. Heer (1947), kiu estis fintradukita en kunlaboro kun Jakob Schmid kaj Paul Le Brun. Ĉi tiuj verkoj kaj ankaŭ la broŝuro *Pensoj de Zamenhof* (1945) povis esti eldonitaj de SES dank' al la financa helpo de la tradukinto mem, kiu estis ankaŭ mecenato de artistoj. Siajn Eo-travivaĵojn B., kiu estis UEA-delegito en Bazelo kaj honora membro de SES (1951), resumis en la aŭtobiografio *Esperantisto dum 60 jaroj* (1967).

→Bazelo →Bibliografio

BAHAANOJ

Laŭ *EdEo* bahaismo estas religia movado, devenanta el Persujo (nuntempa Irano) kaj multe persekutata siatempe. La fondinto de tiu movado nomiĝis Baha'u'llah (1817-92). Laŭ propra priskribo bahaismo instruas sendependan serĉadon de la vero, rezignon pri ĉiuj superstiĉoj kaj antaŭjuĝoj, unuiĝon de la homaro. Krom la religiaj principoj ĝi predikas universalan pacon, proklamas la egalrajtecon de ambaŭ seksoj, la limigon de la ekstretoj de riĉeco kaj malriĉeco, la universalan kulturalan edukadon kaj – la adopton de neŭtrala universala lingvo en la lernejoj de la mondo kiel duan lingvon apud la gepatra lingvo. Baha'u'llah, kiu en siaj verkoj kaj paroladoj evidentiĝis kiel admiranto de la lingvo Eo, dum siaj vojaĝoj plurfoje parolis antaŭ e-istoj kaj ordonis al la B. en oriento zorge studi ĉi tiun lingvon. Fakte multaj B. de la terglobo lernis Eon. Unua bahaa fakkunveno okazis dum la 17a UK en Ĝenevo (1925), kie Lidia Zamenhof (1904-42), plej juna filino de L.L. Zamenhof, ekrilatis kun B. kaj sekve aliĝis al tiu religio, fariĝante en ĝi elstara reprezentantino de la Eo-movado kaj tradukante plurajn gravajn bahaaajn verkojn en Eon. Post la dua mondmilito e-istaj aktivecoj okazis kadre de la Ĝeneva Buroo de la internacia bahaa komunumo. En 1973 estis fondita Bahaa Eo-Ligo (BEL), kiu fariĝis faka asocio de UEA. En Svislando kelkaj personoj aktivis/as kadre de la landa sekcio de BEL kaj de la t.n. Nacia Spirita Konsilantaro de la B. de Svisujo, ekzemple →*Dietrich Weidmann*, →*Serge Reverdin*, →*Georgette Gaussen* k.a. →*Etty Graeffe* (1897-1969), kiu havis amikaron aparte inter la B., kunorganizis plurajn Eo-kursojn kaj aliajn aranĝojn en →Tiĉino. La tiĉinano →*Eugenio Boggio* (1902-73) informadis pri Eo en lernejoj, en framasonaj kaj bahaaaj medioj. Ankaŭ →*Auguste Forel* (kaj ties nepino) simpatiis kun la bahaaaj instruoj.

Esperanto-BALONO



Temas pri varmaera B., kiu estis financita de la zurika ES kaj lanĉita la 14an de decembro 1976 (plej unua flugo). Okaze de la unua poŝta flugado ĝi kunportis 2500 specialajn kovertojn, kiuj surhavis la poŝtstampon de la zurika urbeto Grüningen, kie la B. surteriĝis. La oficiala inaŭguro-bapto okazis la 18an de decembro 1976 ĉe Guldenen sur Forch apud Zuriko, en la ĉeesto de kvindekda e-istoj. La baptopatrino estis Hanni Liechti, edzino de la tiama prezidanto de la zurika ES, →Fritz Liechti. En la postaj jaroj la Eo-B. flugadis tra diversaj regionoj de Svislando. Registrita sub la signo HB-BEO, la B. portis grandlitere la nomon de Eo. La usona konstruaĵo estis 18 metrojn alta kun diametro de 15 metroj, kaj ĝia volumeno ampleksis 1600 kubajn metrojn. La B. servis kiel motivo por la unua Eo-poŝtmarko eldonita en 1979. La 28an de julio 1979 la B. startis okaze de la 64a UK en Lucerno. Ankoraŭ en 1983 la B. flugis plurajn fojojn en diversaj regionoj de Svislando. →Filatelo

Charles BAUDOIN

1893-1963



B. estis konata franc-devena psikanalizisto, verkisto, poeto kaj humanisma filozofo. Dum la unua mondmilito la malsana 22-jaraĝulo estis eligita el la franca armeo. Sekve li venis al la ĝeneva regiono, Svislando, por resanigi siajn pulmojn kaj ne plu forlasis ĝin. Scipovante la germanan lingvon same bone kiel la francan, la juna psikologo, kiu estis nomita „la franca Freud”, bone konis la diversajn skolojn kaj teoriojn pri la homa psiko, pri konscio kaj nekonscio (Freud, Adler, Jung, Coué k.a.) kaj havis la okazon alproksimiĝi al Romain Rolland, Stephan Zweig, Carl Spitteler, Adolphe Ferrière kaj →Auguste Forel. Tiel B. multe kontribuis al la diskonigo de la malkovroj de S. Freud kaj de C.G. Jung en la franclingvaj landoj. En *Le Carmel*, revuo fondita de B., 1916-18 estis publikigitaj liaj diversaj intelektaj artikoloj pri militaj temoj kaj la problemoj de la naciismo.


Post studoj pri filozofio en Nancy kaj Parizo (Sorbono), kie li vizitis la lecionojn de la filozofo Henri Bergson, B. licenciĝis en 1912 kaj en 1922 defendis sian doktorigan disertacion pri sugestio kaj memsugestio (aŭtosugestio). Unue li fariĝis instruisto pri filozofio en la liceo de Neufchâteau (Vogezoj). Sed en 1915 li preferis akcepti la inviton de →Pierre Bovet kaj Edouard Claparède al Ĝenevo por partopreni la aktivecojn de la Instituto Jean-Jacques Rousseau. En 1924 B. mem fondis la Internacian Instituton pri psikagogio kaj psikoterapio (kiu hodiaŭ nomiĝas Internacia Instituto pri psikanalizo kaj psikoterapio).

Samjare li lanĉis ankaŭ la revuon *Action et Pensée*. Laŭ B. la psikoterapio karakteriziĝas ne tiom per speciala metodo, kiom per iu spirito, iu maniero aliri la psikajn problemojn, kiu integras diversajn metodojn (Piron). Eble plej interesa estas la de B. evoluigita koncepto pri personeco komprenata kiel ‘agejo’, kie viglas sep tendenco-faskoj pli malpli konfliktaj inter si (rutinema, instinkta-ĝuema, aspekt- kaj plaĉ-emfaza, racia-respondeca, klarec-evita, devodifina kaj saĝecema), en kaj inter kiuj psikoterapio povas establi sanan ekvilibron, tiel liberigante la homojn el psikaj problemoj kaj suferoj. Ekde sia junaĝo B. emis verki poemojn, krom en la franca lingvo ankaŭ en Eo. Li francigis plurajn verkojn el la germana literaturo, ofte tra la respektiva Eo-versio.

Kun la lingvo Eo B. konatiĝis kiel knabo en la baza lernejo. Lia instruisto tre ŝatis la lingvon kaj rekomendis al la lernantoj lerni ĝin. Ankaŭ B. akceptis kaj rapide atingis bonan rezulton. Liaj poeziaĵoj parte aperis en la revuo *Esperanto*. Dum la ĝeneva UK de 1925 li prelegis en la Somera Universitato en Eo pri la temo ‘Kulturo de la spirita forto’. En Biblioteko Tutmonda (Berlino: Rudolf Mosse, Esperanto-Fako, 1926, n-ro 5-6) aperis lia libreto titolita *La Arto de Memdisciplino*. Laŭ noto de →Hans Jakob B. deflankiĝis de la Eo-movado pro la forelekto de →Edmond Privat kiel UEA-estrarano en 1934. Sed li ne rezignis jen kaj jen verki artikolojn favorajn al Eo, ekzemple en majo 1953 en la gazeto *Coopération* sub la titolo *L’espéranto, langue vivante*. Samjare en tiu gazeto eĉ aperis Eo-kurso. Kvankam B. preskaŭ neniam partoprenis aktive en la e-ista vivo aŭ vizitis kunvenojn de Eo-kluboj, B., kiu estas menciita en *EoeP* (1974), tamen ĉiam restis simpatie ligita kun la Eo-movado, regule pagante sian kotizon al la ĝeneva EG La Stelo ĝis sia morto en 1963.

→Ĝenevo →Universalaj Kongresoj

Arthur BAUR
*1915



Filo de profesoro pri fizika kemio en la zurika teknika altlernejo (ETH), la zurikano B. studis (1933-40) la germanan, retoromanĉan, anglan kaj islandan filologiojn en la universitatoj de Zuriko, Upsalo, Stokholmo kaj Parizo, kun studrestado en Londono, kaj doktoriĝis (1940) per disertacio pri la adjektivo ĉe Boethius de Notker. En 1941 li diplomiĝis kiel gimnazia instruisto pri la germana kaj angla lingvoj. Sian ĵurnalistan karieron B. komencis kiel sola redaktoro de la gazeto *Wochenblatt von Pfäffikon* (1942-45) kaj daŭrigis ĝin ĉe *Neue Berner Zeitung* kiel redaktoro pri eksterlandaj aferoj (1945-59) kaj kiel ĉefredaktoro (1959-67). Poste li fariĝis kaj estis ĝis sia pensiĝo ĉefredaktoro de *Der Landbote* en Winterthur (1967-80). B. membris en pluraj organizaĵoj kiel en Svisa Ĵurnalista Asocio kaj en Berna Ĵurnalista Societo, kiun li prezidis, li estis estrarano de Zurika Ĵurnalista Societo kaj membris en la CK de Svisa Ĵurnalista Unuiĝo (VSJ), en la CK de Verein Schweizerdeutsch, en la svisa aŭtorrajta asocio Pro Litteris kaj en la Svisa Nacia Unesko-komisiono (de 1975). Al la nacilingva (fak-)publiko B. fariĝis konata kiel aŭtoro de klasikaj, regule reeldonitaj kaj ofte uzataj lernolibroj pri la svisgermana (alemana) lingvo, ĉefe *Schwyzertütsch, Grüezi mitenand. Praktische Sprachlehre des Schweizerdeutschen* (12a eld. 2002) kaj *Was ist eigentlich Schweizerdeutsch?* (1983). Kiel fakulo pri la retoromanĉa lingvo li verkis la librojn *Allegra genügt nicht! Rätoromanisch als Herausforderung für die Schweiz* (1996) kaj *Viva la Grischa: ein Wegweiser für das*

Bündnerromanische (1997). Ankaŭ post sia emeritiĝo (1980) B. verkis prilingvajn artikolojn por diversaj svisaj gazetoj. B. estas menciita en *Historisches Lexikon der Schweiz / Dictionnaire historique de la Suisse* (2003).



Libroj de Arthur Baur

B. lernis Eon en 1930 kiel gimnaziano kaj aliĝis al la zurika ES, al SES kaj UEA. En 1932 li ekredaktis Eo-cirkuleron sub la titolo *La Sonilo Malgranda*, poste nomata *La Ĉiulandulo* (ĝis 1933) kaj partoprenis unuafoje la ĝeneralan kunvenon de SES, en 1934 sian unuan UK (Stokholmo). En la tempo dummilita li oficis kiel vicprezidanto de SES (1939-42), redaktoro de *Svisa Espero* (1951-62), poste ankaŭ kiel prezidanto de SES kaj redaktoro de *SER* (1980-86). Li gvidis la informservojn de la 31a kaj 32a UK (ambaŭ okazintaj en Berno, 1939 resp. 1947) kaj la gazetaran servon de la 64a UK (Lucerno 1979). Li estis la ĉefredaktoro de la →*Svisa Antologio* (1939), kaj li verkis la kursojn *Esperanto in 5 Lehrbriefen* (1942) kaj *Esperanto per Post* (1958, reeldonita en 1963), same la SJW-kajeron *Deine zweite*

Sprache (1960). Dum pluraj jardekoj (1947-91) li redaktis parton de la Eo-programo de SRI (→Radio). Komisiita de SES, 1954-87 li prizorgis la germanlingvan eldonon de *Esperanto-Information* por la nacilingva gazetaro, de kiu aperis 160 eldonoj. En 1976 li skribis ankaŭ la tekston *Von der Utopie zur Wirklichkeit - Geschichte der Plansprachen* (ĝi aperis en *Der Landbote* kaj kiel aparta broŝuro) kaj kompilis la enhavon de la flava inform-flugfolio *Esperanto heute*. En 1979 aperis lia libro *La fenomeno Svislando*, kiu estis distribuita al la partoprenantoj de la 64a UK en Lucerno. B., kiu estis ankaŭ ano de la Akademio de Eo, fine de la 1940aj jaroj reprezentis, kun →Edmond Privat, SESn en la Svisa Packonsilio kaj en la Svisa Asocio por Unuiĝintaj Nacioj. En 1953 li helpis aranĝi ekspozicion pri Eo en la Svisa Nacia Biblioteko en Berno. En 1959 SES distingis lin per la honora membreco. UEA atribuis al li tiun honortitolon en 1980.



Arthur Baur, *Deine zweite Sprache*, SJW 1960

→Radio →Zuriko →SES →Ĵurnalismo →Familioj
→Svislando →Bibliografio →Antologio

Heidi BAUR-SALLENBACH

1916-2006



La edzino de →Arthur B. (ekde 1943) studis la germanan kaj anglan lingvojn kaj literaturojn en la zurika universitato, kie ŝi doktoriĝis en 1941 per disertacio pri George Sand kaj la germana emancipiĝa romano. Poste ŝi laboris kiel sendependa ĵurnalistino kaj teatra kritikistino.

B. lernis Eon en 1936/37 kaj kunlaboris kun sia edzo en diversaj Eo-aktivecoj, precipe en la pretigo de la *Svisa Antologio* kaj de radioprelegoj por SRI. Krome ŝi instruis Eon en la popola altlernejo de Berno.

En sia alta aĝo ges-roj B. transloĝiĝis al maljunulejo en Männedorf/ZH.



BAZELO

Kantono en norda Svislando germanlingva, dividita en du t.n. duonkantonoj: Urbo (germanlingve: Basel-Stadt, mallong. BS, 37 km², 186'100 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Basel (en Eo laŭ PIV: Bazelo); Kamparo (germanlingve: Basel-Landschaft, mallong. BL, 517 km², 266'200 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Liestal.

Laŭ la nomaro de SES (en *SE* 1/1903) la unua bazela Eo-adepto nomiĝis Hans Breuner-Eglinger. La postaj nomaroj menciis la apotekiston H. Eisenhut kaj la gimnazianon *Fritz Wenk*. En tiu epoko oni venigis al la urbo la tiaman prezidanton de SES, →Friedrich Schneeberger el Laufen, por ke li faru

propagandajn prelegojn. Sekve, en 1905, kun →*Alfred Bader* (1889-1968) kaj *Eduard Wenk* (frato de Fritz Wenk) estis fondita la bazela EG, al kiu aliĝis 28 personoj (en 1906 la grupo havis 41 membrojn). Ok tagojn post la formala fondo de la EG aŭ ES, la 15an de novembro 1905, okazis la unua societa kunveno, en kiu oni aprobis la regularon kaj elektis la unuan estraron, kiu konsistis el Fritz Wenk (prezidanto), Alfred Bader (sekretario), kaj Lehner (kasisto). Favoraj artikoloj pri tiuj eventoj aperis en la bazel-urba gazetararo (*National-Zeitung* kaj *Basler Volksblatt*). Al L.L. Zamenhof estis sendita salutkarto, kiu pridankis ĝin en letero de Bader la 27an de februaro 1906 per jenaj vortoj: „Al la Baselaj e-istoj mi sendas koran dankon pro la saluta karto, kiun mi ricevis de ili. Mi esperas, ke ili multe helpados al la sukcesigo de la kongreso de tiu ĉi jaro“. En 1907 estis malfermita Eo-konsulejo ĉe Centralbahnhofstrasse 5. Ĉi tiu sukcesa komenca periodo daŭris ĝis 1908, kiam ekfuroris la reformlingvo Ido, kiu absorbis ankaŭ pastoron Schneeberger kaj la fratinojn Wenk, dum Alfred Bader restis fidela al Eo. Post la fino de siaj studoj Bader forlasis B. por labori en Schaffhausen ĝis 1929 kaj tiam revenis al B.

En 1910 pri la historio de la neŭtrala universala lingvo prelegis en B. la fama kemiisto kaj nobelpremiito (de 1909) Wilhelm Ostwald (1853-1932) el Leipzig (→Antologio). →*Albert Debrunner* (1884-1958), kiu abiturientiĝis (1902) kaj doktoriĝis (1907) en B. kaj kiu fariĝis konata lingvosciencisto (en Germanio, poste en Berno), rakontis dum la IALA-konferenco en 1930, ke en sia junaĝo en B. eblis ofte aŭskulti prelegojn pri la universala lingvo, precipe pri Eo, kaj ankaŭ pri la monda pacmovado, kiu laŭ li formas paralelon al la Eo-movado.

En 1911 la disfalintan bazelan Eo-movadon rekonstruis *H. Rusterholz* kaj *Charlotte Pulvers*. La 15an de februaro 1911 okazis propaganda parolado de la berna Eo-pioniro →*Jakob Schmid* en la gildejo Rebleuten, kiun partoprenis 80-100 personoj, ankaŭ Schneeberger kaj aliaj idistoj, kiuj partoprenis la diskuton. Malgraŭ tiu propaganda klopodo en 1912 troviĝis nur 6-8 membroj, kiuj kunvenis kadre de la bazela ES. En 1914 Eduard Wenk proklamis antaŭ 60

aŭskultantoj sian revenon al Eo. Dum la milito la ES nombris 16-20 anojn.

En 1919, dank' al la klopodoj de →*Friedrich Uhlmann* (1881-1938), kiu ekloĝis en B., la Eo-movado iom revekigis. En marto →*Immanuel Olsvanger* (1888-1961) gvidis kurson kun 50 personoj, kaj en majo la bazelanoj organizis la jarkunvenon de SES. Kadre de la Svisa Specimena Foiro estis starigita Eo-stando (laŭ la revuo *Esperanto* de UEA, n-ro 6/1922, la foiro uzis ankaŭ Eon kiel lingvon por la korespondado). Ĉi tion sekvis sukcesa societa kunveno kun 200 partoprenantoj kaj kun Uhlmann kaj Schmid kiel prelegantoj.



Charlotte Pulvers kaj Fritz Wenk




Alfred Bader, Friedrich Uhlmann, Jeanne Schmutz

En la 1920aj jaroj Eon lernis →*Hermann Schmutz* (1896-1993) kaj lia posta edzino *Jeanne Saenger* (1895-1982). La paro vaste uzadis Eon por siaj vojaĝoj kaj kontaktoj, prefere en la fervojista kaj laborista movadoj (SAEF kaj SAT). En tiu tempo, do ĉ. 1926/27, iu K. Deutschle instruis Eon, ĝuste ankaŭ al Schmutz kaj Saenger kaj al 12-15 aliaj personoj, i.a. al *Nerina Gessaga* en Birsfelden/BL. En 1928 Gessaga vojaĝis al

Moskvo pere de Eo por partopreni sportan aranĝon kaj renkonti sian sovetian Eo-korespondanton. Tiam en B. ekzistis *Laborista ES*, kies fundamento laŭ informo de *La Semanto* (nov. 1935) estis fiksita en 1925 kaj kiu funkciis ĝis 1939, do ĝis la komenco de la dua mondmilito. La jarlibro de SAT de 1927/28 indikis 6 adresojn en la urbo B., aliajn en Allschwil (ges-roj Schmutz), Birsfelden (Gessaga), Liestal (Josef Kullnig) kaj Riehen (Walter Suhr). Kiam la membroj de la grupo timis, ke la nacisocialistoj povus okupi B. kaj persekuti la laboristajn e-istojn, ili decidis kaŝi la Eo-libraron kaj aliajn esperantaĵojn en la subtegmentejo de la familia domo de ges-roj Schmutz en Allschwil.



La paro Jeanne kaj Hermann Schmutz-Saenger



André Schild kaj Hans-Werner Grossmann


La 10an de aprilo 1937 la lingvoinstruisto → *André Schild* (1910-81) anoncis la refondan kunvenon de la bazela ES. Pli kaj pli Schild simpatiis kun la lingvo → *Occidental-Interlingue*, sed en 1947 li publikigis sian propran planlingvan projekton → *Neolatino*,

antaŭ ol en 1951 transiri al → *Interlingua* (IALA), kie li restis.

Post mallonga prezidado fare de *Samuel Leuenberg* (1872-1964) la ES estis transprenita denove de Alfred Bader, kaj kun la ĉeesto de ges-roj Schmutz komenciĝis trankvila kaj stabila periodo por la bazela ES. La edzino de Samuel Leuenberg, *Ida Leuenberg-Burkhard* (1880-1959), ankaŭ estis Eo-parolantino (de 1918). La plej grava aranĝo de tiu tempo estis la jarkunveno de SES okazinta en B. kun 90 partoprenantoj (1952).



Bazelaj esperantistoj: Samuel Leuenberg, Heinrich Ringli, Louise Tissot-Martin



Du fotoj pri Heinrich Ringli


Nova vento ekblovis en B., kiam fine de la 1950aj jaroj aperis la juna anglo *John Catling*, kiu edzinigis membrinon de la grupo, la junan lucernaninon → *Sonja Brun*. Kune ili organizis en 1962 la 75-jaran jubileon de la lingvo Eo, lige kun la SES-tagoj. Catling ankaŭ komencis gvidi kursojn, tamen neniu el la lernintoj restis longe en la grupo. Kiam Catling translokiĝis al Anglio, Bader petis al Kurt Schweizer, instruisto en B., transpreni la prezidon – en aŭtuno 1962 Schweizer akceptis ĝin. Schweizer, sub kiu

estis akceptita nova statuto, havis ankaŭ muzikan talenton kaj volonte distris la grupanojn per mem tradukitaj popolkantoj, samtempe instruante Eon, eĉ se estis nur malmultaj partoprenantoj. El liaj lernintoj restis dum jaroj en la grupo Heinrich Ringli, Franz Lang, J. Weibel kaj ges-roj Sütterlin. La plej sukcesa aranĝo dum la periodo de Kurt Schweizer estis la trilanda renkontiĝo en la jaro 1966. El Svislando, Francio, Germanio kaj Aŭstrio unuiĝis pli ol 100 gesamideanoj; la programo antaŭvidis ŝipan veturon sur la rivero Rejno kaj komunan dancludon en la restoracio Brauner Mutz. Pro translokiĝo al Ettingen, Schweizer, kiu sukcesis konstrui grupon kun 26 membroj, pludonis la prezidan torĉon en 1969 al *Heinrich Ringli* (1903-94). La iama vendisto de mem prilaborita ligno kaj de ĝardena materialo lernis Eon en 1963, prezidis la bazelan ES ĝis 1975 kaj estis protokolanto de LKK de la 64a UK (Luzern 1979). En la memoro de liaj konatoj restis, ke aparte interesis lin la ig-iĝ-demando en Eo, pri kiu li ofte verkis kaj parolis inter la kolegoj.


Ĉiujare en somero, la grupo ekskursis al la lago de Neuchâtel, kie ges-roj Sütterlin posedis ferian domon. Lingvokursojn gvidis →*Erna Döring* (*1920) kaj s-ro Lang. Por efike praktiki la lingvon, Döring enkondukis liberajn kunvenojn kaj invitis en 1974 la nederlandan e-iston Ed Borsboom por prezenti la vivon de Lanti, fondinto de SAT. Kiam Ringli demisiis en 1976 estis elektita Erna Döring, la plej vigla membro, kiel nova prezidantino de la bazela ES. Ĝin ŝi gvidis ĝis 1989, sama jaro ĝis kiu ŝi redaktis ankaŭ la kluban organon *Kuriero de Esperanto*, fonditan de ŝi en 1981. Kun sia 80a numero la bulteno ĉesis aperi en la jaro 2000, por esti anstataŭita de *Sud-Rejna Kuriero*, kunlabore kun la alsacaj e-istoj. Tra ŝiaj kontaktoj kun la fervojista, laborista kaj naturamika movadoj, t.e. kun SAEF/IFEF, SAT kaj TANEF, povis esti utiligataj multflankaj sinergioj. La realiĝo de la 54a SAT-kongreso en B. (1981) okazis grandparte dank' al ŝia organiza aktiveco. En 1987, kunlabore kun KCE, Döring ankaŭ helpis aranĝi ekspozicion pri Eo kaj interlingvistiko en la bazela universitata biblioteko. (→Bibliotekoj kaj ekspozicioj)

En la 80aj jaroj la organizo transformiĝis laŭstatute al ES Basel. Post la retiriĝo de Döring en 1989 nova gvidantino de la bazela ES fariĝis *Nicole Bérout-Focke* (*1953). Ĉi tiu magistrino (munkena universitato, 1978, ŝtatekzameno 1979), instruistino kaj pedagogino lernis Eon en 1984 per kursoj de KCE kaj en 1989 aliĝis al SES kaj UEA.

Aliaj membroj de la bazela ES nomiĝas Louise Tissot-Martin kaj Alice Schweighauser, Patrick Rentsch, Carlo Nicolodi (→Laboristoj), Hans-Peter Senn, Hans-Werner Grossmann kaj →Guido Appius.



Erna Döring, Guido Appius (supre)
Hans-Peter Senn, Carlo Nicolodi (sube)



Laŭ *SE* 3/1942 Louise Tissot-Martin eklernis Eon post konatiĝo kun →Edouard Ducommun, kiu feriadis kun sia familio en Frutigen/BE. En la 1980aj jaroj vivis kaj laboris en B. (ĉe la firmao Intercontainer) la jugoslavia e-isto *Gvozden Sredić*. En 1981 li fondis en B. la Eo-sekcion de la klubo de jugoslaviaj gastlaboristoj. Intertempe li rehejmiĝis al Serbio.


La 100-jaran jubileon de la ekzisto de la bazela ES ĝiaj membroj solene festis en decembro 2005. Okaze de tiu jubileo aperis la

bro 2005. Okaze de tiu jubileo aperis la dua, kompletigita broŝuro *100 jaroj ES Basel 1905-2005*, kompilita de Erna Döring kaj Hans-Peter Senn, kaj estis prezentita ĉi tiu omaĝ-teksto enciklopedia.

Ne nur en la urbo, sed ankaŭ en la *kantono Basel-Landschaft* (BL) estis faritaj klopodoj disvastigi Eon. En 1909 → Jakob Schmid el Berno prelegis en la urbetoj Liestal kaj Sissach. Laŭ informo en *Vespera Horo*, en 1910 estis starigita EG *Liestal* kaj la 14an de septembro 1911 okazis la fondo de EG *Sissach* sub la prezido de *Charlotte Pulvers*. *Svisa Espero* raportis en 1912, ke en la vilaĝo Gelterkinden prelegis Jakob Schmid antaŭ 80 personoj kaj ke Pulvers komencis Eo-kurson kun 26 anoj.

El la kantono BL devenis la svisa politikisto → *Emil Frey*, alta protektanto de la berna UK en 1913 kaj varma apoganto de Eo.

Ekde 1993 UEA estas reprezentita en MuttENZ/BL de *Hans-Werner Grossmann* (*1937). La emerita komerca diplomito kaj iama estro de la administrego de salajroj kaj de la pensia kaso en bazela asekurkompanjo estas e-isto ekde la mezo de la 1950aj jaroj. Eon li lernis ĉe → William Perrenoud en la komerca lernejo de Neuchâtel por poste regule partopreni la semajnfinojn de EJS. Krome li aktivis en la zurika ES (kie li surbendigis Eo-tekstojn por blinduloj). En 1962-63 li partoprenis la Karavanon de Amikeco de Tibor Sekelj tra Afriko. En la bazela ES li aktivis kiel kaskontrolanto kaj kursgvidanto. Ekde 2004 Grossmann, ankaŭ dumviva membro de UEA, estas kasisto de SES.




Nicole Bérout-Focke kaj la broŝuro kun la historia skizo pri ES Basel



Max-Henri BÉGUIN

1918-2000



Post sia abiturienta ekzameno en La Chaux-de-Fonds/NE B. studis medicinon en la universitatoj de Neuchâtel kaj Zuriko. Pro rifuzo de la soldata deĵoro li enprizoniĝis en punlaborejo. Tiam lia kristana sinteno alproksimigis lin al la kvakeroj, pere de kiuj li konatiĝis kun → Edmond Privat kaj Pierre Cérésolle, la fondinto de → Civilservo Internacia. Post la fino de siaj medicinaj studoj, B. deĵoris en Saarbrücken, Germanio, kadre de labor-taĉmento de Civilservo Internacia. Poste B. fakiĝis kiel infankuracisto. En 1953 li malfermis sian propran praktikejon en La Chaux-de-Fonds. Tie li baldaŭ famiĝis ne nur pro sia sindonemo profesia, sed ankaŭ pro sciencaj nutradesploroj, kiuj demonstris la misefikon de la rafinitaj sukero kaj faruno sur la formiĝon de la dentoj kaj ostoj kaj evidentigis la neceson de la ekvilibrita nutrado. Dank' al tiuj ekkonoj miloj da infanoj akiris senkarian dentaron. Krom medicino B. estis konata en la kantono Neuchâtel pro siaj kampanjoj favore al la protekto de la montaro (ĉefe Mont Racine kaj Creux-du-Van) kaj al la savo de detruotaj farmdomoj.

B. konatiĝis kun Eo kadre de → Civilservo Internacia. Kun sia familio li sekve partoprenis plurajn Eo-aranĝojn, i.a. la unuajn restaĵojn en Primošten (tiam Jugoslavio). Lia prelego pri 'Satjagraho hodiaŭ aŭ aktualeco de aktiva neperforto', kiun li prezentis la 23an de novembro 1968 en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds kadre de kultura semajnfino pri Mahatma Gandhi, estis publikigita en la revuo *La Juna Penso* de la SAT-junularo en aprilo 1971. Tra B. → Claude Gacond povis prezenti Eon kaj ties homarani-

sman mesaĝon ĉe la celpublikoj de B., tiel ke sennombraj personoj ekhavis imagon pri la kultura valoro de Eo.

La Eo-muzikistino *Danielle Béguin* estis la nevino de B. Ankaŭ ŝia patro scipovis kaj ŝia frato konas Eon.

→Civilservo Internacia →Neuchâtel



BERNO

Kantono en okcidenta Svislando german- kaj parte franclingva (germanlingve: Bern, franclingve: Berne, mallong. BE: 5959 km², 957'600 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Bern (en Eo laŭ PIV: Berno).

La unuaj nomaroj de la e-istoj, publikigitaj en *Svisa Espero* (SE) en 1903, listigis la nomojn de Ad. Gygax en Saint-Imier kaj Hermann Alfred Tanner (vd. sube). Ankaŭ aperis la nomo de Oscar Hopf, eldonisto kaj presisto en Thun (SE 5/1903) kaj redaktoro de *Winter im Bernerland*. En lia eldonejo dum 1904 aperis *Svisa Espero* kaj la turisma prospekto *Tra Berna Oberlando* (1906), por tiamaj kondiĉoj lukse presita eldonaĵo kun 30 ilustraĵoj.

Theodor Hopf (+1919), farmaciisto-apotekisto en Adelboden/BE, supozeble la parenco de Oscar Hopf, verkis unu el la plej fruaj propagandaj broŝuroj: *Die internationale Hilfssprache 'Esperanto'* (Thun 1903). Theodor Hopf kunlaboris kun la redakcioj de *Tra la Mondo* (Meudon, Francio, 1905-09) kaj invitis la e-istojn libertempi en sia alpa vilaĝo Adelboden. En januaro 1909 SE anoncis la ekziston de la t.n. *Eldorado*, kiu devis esti speco de Eo-feriejo aŭ Eo-aranĝo en Adelboden (pri ĝi mankas precizaj informoj kaj raportoj; →Turismo). Ĝi estis interrompita pro la eksplodo de la unua mondmilito kaj poste ne plu daŭrigita (kiel siatempe rakontis la posedanto de la ĉaledo en Boderlen, Adelboden, kiu estis luita de la posta generacio de EJS/EES-gastoj kiel feriejo). Ĝis 1912 Theodor Hopf servis al UEA kiel ĝia delegito.



Turisma gvidilo de Oscar Hopf en Thun



Prospekto de la apotekisto Theodor Hopf en Adelboden

En *Laufen*, urbo tiam apartenanta al la berna kantono, nun parto de BL, vivis kaj agadis →*Friedrich Schneeberger* (1875-1926). Ĉi tiu protestanta pastoro aliĝis al la Eo-movado en la sesa nomaro publikigita en SE 6/1903. Pro la aktiva varbagado kaj ofta prelegado de la ĉilasta, dekoj da kursanoj komencis lerni Eon, tiel ke fine de 1907 SES registris 115 bernajn adresojn. Menciindas la aliĝoj de Karl Haase de la Kantona Direkcio pri internaj aferoj (10a nomaro 1904), Paul Werner, estro de la servo Securitas en B. (16a nomaro 1905) kaj de M.H. Morel, direktoro de la Internacia Oficejo de la propraĵoj literatura, arta kaj industria.

Urbo: La urb-berna EG mem estis fondita la 21an de marto 1906, do en la periodo antaŭ la 2a UK en Ĝenevo, far *Joseph Feierabend* (+1947), oficisto en la ĝenerala direkcio de la svisaj fervojoj (SFF). En 1903-04 li apartenis al la CK de SES kiel ĝia kasisto kaj provizore prezidis la asocion post la demisio de →Eu-


gène Failletaz, unua prezidanto de SES. En 1906 →Karl Jost prelegis en la Berna Asocio de socialdemokrataj abstinuloj. En 1907 okazis kurso kun 70 partoprenantoj, sed nur malmultaj eniris la grupon. Dum la Ido-krizo Schneeberger kaj Feierabend transiris al Ido kaj postlasis senteban truon en la juna Eo-movado. Kiel novaj socispecifaj Eo-ĉeloj aperis krom la framasonoj, kiuj en 1907 propagandis Eon, la *socialista* EG en 1908, kaj samjare estis starigita la EG ĉe la *urba gimnazio* kun 20 anoj, sub la prezido de Otto Schmid. La kafejo Berna en Schaufplatzgasse servis al la e-istoj kiel renkontiĝejo. En 1909 la berna EG estis prezidata de →Eduard Stettler (1880-1940). En 1910 en B. prelegis ankaŭ la nobelpremiito (de 1909) Wilhelm Ostwald el Leipzig pri la demando de la internacia lingvo. En 1913 estis starigita *katolika* ES en protestanta ĉirkaŭaĵo. En la sama jaro okazis ankaŭ la 9a UK en B. en la konstruaĵo de la Casino, sub la alta protekto de →Emil Frey, prezidinto de la Svisa Konfederacio (1894) kaj deĵoranta direktoro de la Oficejo de la Internacia Telegrafa Unio. (→Universalaj Kongresoj)

La idistoj, kiuj siatempe disvolvis sian propagandon en B. sub la gvido de →Hans Cornioley (1896-1977), ĝenis la kongreson per malagrabra interveno. Cornioley, la ĉefa motoro de la berna Ido-grupeto en la 1920-30 jaroj, estis timata pro sia akra polemiko kontraŭ Eo, kiun publikigis ekzemple *Berner Schulblatt* en 1928. La supre menciita →Hermann Alfred Tanner (1873-1961), kiu restis ĉe la e-istoj en la memoro kiel provokema portanto de la Ido-stelo dum iliaj kunvenoj, vane klopodis reunuigi e-istojn kaj idistojn. En 1928 li mem aliĝis al la Occidental-movado. (→Ido, →Occidental-Interlingue)

En 1913 de Genevo al B. transloĝiĝis →René de Saussure (1868-1943) por instrui movan geometrion kiel privatdocento en la berna universitato (1920-25). En Hotelgasse 10 troviĝis lia centra oficejo, de kie li gvidis siajn Eo-aktivecojn. En B. li ellaboradis kaj



Jules Perlet



Fruaj pioniroj: Jakob Schmid, Eduard Stettler, René de Saussure

aperigadis ne nur sian faman vortteorian analizon (1910), sed daŭrigis siajn kontestatajn reformprojektojn. (→Interlingvistiko)

En 1916 de Saussure prelegis antaŭ francaj militkaptitoj en hotelo Beau-Rivage en Thun kaj en Caux. Kun de Saussure kunlaboris en B. →Jules Perlet (1887-1964), ŝtata oficisto, konata kiel pioniro precipe de la svisa fervojista Eo-movado, kiel fervora Eo-propagandisto kaj kiel aŭtoro de originalaj Eo-lernolibroj. En 1923 Perlet sukcesis atingi la enkondukon de la Eo-instruado en la klerigan lernejon de la bernaj dungitoj (Fortbildungsschule des Bernischen Beamten- und Angestelltenverbands). Perlet ne estu intermiksita kun Jean Perriard (1889-1975), frua Eo-pioniro, kiu laboris kiel revizoro ĉe la ĉefdirekcio de la svisaj fervojoj en B. kaj kies agado pli apartenis al KELI kaj SAEF.



Supre: domo Museumsstrasse 14 (UEA)
 Sube: Bundesgasse 16 (Stettler; fotis A. Künzli)



En 1919 la oficejo de UEA kaj evidente ankaŭ ties biblioteko situis en B., Museumsstrasse 14, kie oni trovis restadejon dum kelkaj monatoj. Gravan rolon en la tiam UEA ekludis, krom →Hans Jakob, la supre menciita bernano →Eduard Stettler, juristo apartenanta al loka patricia familio, loĝanta en Bundesgasse 16. Ĉi tie ni memorigu, ke →Hector Hodler, kunfondinto de UEA, tra sia patro, la mondfamiĝinta pentristo Ferdinand Hodler, estis berndevena.

La epoko kun la plej granda membronombro de la berna EG estis enkondukita de la famaj

kursoj de Andreo Cseh. En 1931 Eo estis propagandata vastskale, tiel ke 350 personoj partoprenis la provlecionon de Cseh en oktobro; el ili restis centoj kiel kursanoj. En tiu jaro (7a de julio) vizitis la bernano ES kun prelego ankaŭ →Joseph R. Scherer, svisdevena usonano, kiu faris propagandan mondvojaĝon kiel speciala delegito de la Internacia Centra Komitato en Ĝenevo. Siajn salutojn li enskribis en la kronika libro de la societo. Ĉi tiuj sukcesoj poste ripetigis, kiam ankaŭ la Eo-kursoj de la rumano Tiberio Morariu en aprilo 1932, de la svedo Persson en 1939 kaj de la norvego Nicolaisen en 1947 altiris multajn novajn interesigantojn, nome 60 novajn aliĝojn en 1939 kaj 50 en 1947. En 1939 la EG atingis sian plej multnombrian membraron, nome 128. Dum la 30aj jaroj la berna EG estis prezidata de *Heinrich Georg Rotach* (1894-1988), komerca oficisto, korespondanto fremdlingva kaj stenografo, kaj ano de la liberekonomia movado de Silvio Gesell. Al la Eo-movado Rotach aliĝis en 1930, gvidis plurajn Eo-kursojn kaj uzis Eon profesie. Rotach fariĝis ankaŭ prezidanto de SES en 1937, sed demisiis pro protesto kontraŭ la aliĝo de SES al IEL.

La 1an de novembro 1933, per iniciato de →*Eduard Spielmann* (1870-1938) en B. estis inaŭgurita →*Svisa Esperanto-Instituto*. Ĝi havis sian sidejon en Gesellschaftsstrasse 39. Laŭ ĝiaj esencaj celoj, la instituto, kiu estis direktata de Spielmann mem, okupiĝis pri la propagando, instruado, informado kaj praktika utiligo de Eo. Spielmann, kiu aperis en la movado en 1910, disvolvis tre viglan kaj sukcesan agadon, dominante la tiaman Eo-movadon en B. kaj parton de SES. Lia propagando, kiu enhavis Eo-lingvokursojn, disradiis ne nur en B., sed ankaŭ en aliaj regionoj kiel Lucerno kaj Olten/SO kaj tiel esence kontribuis al la (re)fondo de pluraj lokaj EG kaj al la revivigo de la Eo-movado en Svislando. Dum la 9a UK (B. 1913) Spielmann estris la poŝtoservon. Li multe klopodis ankaŭ por la okazigo de la 31a UK (B. 1939), kiun li bedaŭrinde ne ĝisvivis. La kronika libro de la berna ES, kompilata inter 1931 kaj 1955, omaĝis al Spielmann per speciala paĝo kun foto, la oficiala mortanonco kaj nekrologo aperinta en la berna gazetaro.



Eduard Spielmann kaj Hanni Fischer-Buri




Mortanonco pri Spielmann en la berna gazetaro

En la 1930jaroj en B. rolis kiel UEA-delegito *Karl Max Liniger* (+1965). Ankaŭ li estis ŝtata oficisto en B. 1936-41 li okupis la postenon de la prezidanto de la ĝeneva UEA dum la UEA-IEL-dueco. (→UEA)

Dum sia berna periodo (dua duono de la 1930aj jaroj), →*Otto Walder* (1912-88) plenumis diversajn oficojn kiel prezidanto de la loka EG, sed li estis ankaŭ ĉefdelegito de IEL kaj LKK-ano de la 31a UK en 1939 en B. En la rekonstruado de la berna EG kaj organizado de la UK lin aktive helpis la juna grizonano *Martin Ardüser* (1917-43), studento pri nacia ekonomio en la berna universitato. Lerninte Eon en 1936, la gimnaziano vigle ekaktivis en la Eo-movado, kiel membro de la berna EG, dua LKK-sekretario de la 31a UK (B. 1939), IEL-delegito kaj iam ankaŭ kiel vicprezidanto de

SES. Malfeliĉe la junulo pereis akcidente dum la arma deĵoro en Simmental (berna kantono) kiel leŭtenanto de montara infanteria taĉmento, survoje al B. por akcepti sian doktoran diplomon. Tiun tragikan eventon la bernanoj memorfiksis per kelkpaĝa speciala dediĉo en la societa kroniklibro, kie aperis lia foto kaj en kiu *Otto Walder* verkis tre kortuŝan omaĝon pri modela kaj aŭtentika e-isto, kies lastaj linioj tekstis jene: „De la praktika vidpunkto li rigardis nian movadon kiel interkomprenigilon en la praktika vivo, ne sole kiel pacigilon de la mondo aŭ interfratigilon de la homaro, du aferoj, kiuj tro ofte seniluziigis samideanojn, jam plenkonsvinkitajn verdstelulojn. Martin ne pensis al personaj aferoj aŭ al atingo de gloro. Laŭdojn li malpli ŝatis ol bonajn ideojn kaj bonan kunlaboron. Lia cerbo estis plena de planoj, ĉefe por la proksima tempo, planoj ne utopiaj sed konformaj al nia stato, al niaj eblecoj.“



Martin Ardüser kaj Heinrich Georg Rotach



Berna grupo kun la paro Walder, Jules Gilliard k.a.



Ekskurso al Kandersteg en aŭgusto 1931: supre de maldekstre: rumano, skoto, Jakob Schmid, skota pastro, hungaro, Karl Max Liniger; sube: nederlandano, portugalo, anglo, Heinrich Georg Rotach



Bernanoj en 1936 en Zuriko: de maldekstre: Schmid, Rotach, Walder, Liniger, Spielmann



Regiona Kunveno de 1943 en La Neuveville

En la memorlibro de la berna EG troviĝas ankaŭ noto kaj foto de Gyula-Julio Baghy (1891-1967), laŭ kiu la Eo-poeto vizitis la grupon la 20an de majo 1936.



Prospekto pri Berno en Eo, eldono de 1936

B. estas la sola urbo en la mondo, kie okazis tri UK (1913, 1939 kaj 1947 → Universalaj Kongresoj). LKK-prezidanto de la bernaj UK de 1913 kaj 1939 estis alia grava berna Eo-pioniro: → *Jakob Schmid* (1869-1955). Kiel Perlet kaj Liniger ankaŭ Schmid estis ŝtata oficisto (en publika ekonomio). Al la berna EG Schmid servis kiel ĝia sekretario, prezidanto kaj fariĝis honora membro. Estis li, kiu aŭtoris turisman prospekton pri B. (1936).

Kun la morto de Spielmann en 1938 la instituto ĉesis funkcii, sed ĝi estis restarigita postmilite en 1954/55 fare de → *Hanni Fischer-Buri* (1894-1961) en Breitenrainstrasse 12. Ĉi tiu verva virino, kiu lernis Eon instige de la 31a UK (B. 1939), fariĝis prezidantino de la berna EG kaj LKK-anino de la sekva 32a UK (B. 1947). Kun sia

edzo ŝi estris en B. la hotelon-restoracion Metropol ĉe la angulo Waisenhausplatz / Gerechtigkeitsgasse, kiu ankaŭ fariĝis la centro de la bernaj e-istoj.



Hotelo Metropol en Berno



E-istoj antaŭ hotelo Metropol en Berno kaj Julio Baghy, kiu vizitis la bernan EG en 1936

Fischer-Buri instruis la lingvon kaj atingis la enkondukon de la Eo-instruado en la kursaron de la popola altlernejo en B. Per la restarigo de la Svisa Eo-Instituto estis tenataj kontaktoj kun diversaj politikistoj, ekzemple kun →Arnold Bohren aŭ lige kun la tiam disvolviĝinta Eo-kampanjo kadre de Unesko. Kun →William Perrenoud Fischer-Buri kreis ankaŭ la fundamenton por la internaciaj Eo-feriokursoj en la →Kastelo Münchenwiler/BE, ejo disponigata al la bernaj popola altlernejo por la klerigo de ĝiaj partoprenantoj. Tiuj Eo-kursoj estis administrataj kadre de la Eo-Instituto. Post la morto de Fischer-Buri en 1961 ankaŭ la aktiveco de la instituto finiĝis, kaj la nova prezidanto de la bernaj EG fariĝis P. Métivier (ĉ. 1962).

Inter 1938 kaj 1946 la eminenta lingvosciencisto →Albert Debrunner (1884-1958), kunlaborinto de IALA, ofertis en la bernaj universitato lekciojn kaj kursojn pri la historio de la planlingvoj. Alia profesoro de la sama universitato, →Otto Funke (1885-1973), siatempe iom okupiĝis pri la demando de neŭtralaj universalaj lingvoj.



'Gastoj' en Berno: Arthur Baur, Otto Walder, Albert Debrunner

Dum la 1950aj kaj ankoraŭfoje fine de la 1970aj jaroj la bernaj EG estis gvidata de →Hans Herrmann (1926-2002). Ĉi tiu diplomita librobindisto kaj e-isto de 1942 estis movade plej aktiva inter 1950 kaj 1980 kiel membro (ekde 1946) kaj prezidanto (1953-54) de SES, de la bernaj EG kaj kiel delegito de UEA. En esperantujo Herrmann estis iom fama kiel magiisto kun la nomo Hoho, krome li apartenis al la Eo-delegacio de la bernaj popolmarŝoj, okazintaj fine de la 1970aj jaroj.



Prospekto pri Berno en Eo, eldono de 1939

La 4an de decembro 1950 sin prezentis en hotelo Metropol la e-isto Tadros Megalli el Egipto, kie li prelegis kun lumbildoj pri la lando de la piramidoj kaj faraonoj.

Alia menciinda agado estis la instalado de ekspozicio pri Eo kadre de la Svisa Nacia Biblioteko en 1953. Ĝin helpis aranĝi →Arthur Baur, tiama redaktoro de *Neue Berner Zeitung*. Dum pluraj jardekoj (1947-91) Baur redaktis parton de la Eo-programo de SRI, kiu estis produktita en B. (→Radio). Dua simila ekspozicio en la sama loko, ĉi-foje en konsidero de interlingvistiko kaj en kunlaboro kun KCE kaj CDELI, estis realigita en 1979.



Do fotoj pri Gertrud Weigelt

En 1957-59 la berna EG estis prezidata de *Gertrud Weigelt* (1911-87), diplomita bibliotekistino en la universitata kaj urba biblioteko en B. Weigelt ekkonis Eon instige de la 31a UK (B. 1939) kaj sekve transprenis la oficon kiel fakdelegitino de UEA (pri bibliotekoj kaj vegetaranismo). En 1979 ŝi apartenis al la LKK de la 64a UK en Lucerno, responsante pri artaj aranĝoj, kaj kunlaboris kun la Eo-kursoj en Kastelo Münchenwiler (ekde 1959). Ŝi ofte vojaĝis per Eo kaj gastigis multajn e-istojn en Spiegel/BE, kie ŝi loĝis.

Menciindaj estas ankaŭ *Elisabeth Steinmann* (1883-1970), KELI-anino el Rubigen/BE, kaj *Dora Hemman-Krebs* (1909-94). La ĉi-lastaj sinjorino lernis Eon en la 1920aj jaroj. Pro profesiaj kialoj, la apotekistino (en Glarus, Leukerbad/VD kaj B.) povis reaperi en la Eo-movado ne antaŭ 1964. La filatelisto *Hans Lehner* (1904-83) lernis Eon antaŭ la berna UK en 1939 kaj estis delegito de IEL en B. en

la 40aj jaroj. Aliaj bernaj e-istoj, pri kiuj mankas pli precizaj informoj, nomiĝis W. Streun, inĝeniero, O. Berger, radio-telegrafisto, H. Auer, Christian Gruber, Arnold Vonlanthen kaj Charles Vuillemier. Adolf Urscheler apartenis al la fondintoj de la Junular-Sekcio de SES en 1951. En 1961 mortis Emil Keiser (1889-1962) en Liebefeld, kies meritoj apartenas ĉefe al la fervojista movado, kaj en 1991 forpasis Maria Grünig, alia multjara membrino de la berna EG kaj iama UEA-fakdelegitino. *Anna Bertha Gerber* (1915-96), iama instruistino kaj prezidantino de la berna EG en la 1980aj jaroj, estis konata kiel vojaĝanta rulseĝulino, kripliĝinta pro terura trajnakedento en Svedio. La revuo *Rega* prezentis ŝin la 9an de marto 1981, kaj la alemana sensaci-gazeto *Blick* (29.4.1982) rakontis pri ŝia tragika sorto.



Anna Bertha Gerber



Partoprenantoj en la berna popolmarŝo en 1979: estas rekoneblaj Lilly Schaerer (dua de dekstre) kaj Emil Gehring el Lucerno (tria de dekstre).

Dum multaj jaroj *Margrit Guldin* (1924-2006) estis la motoro de la berna EG. Kiel mastrino de la kafejo Tea Room Schär en Freiburgstrasse 2b en B. (1974-84) ĉi tiu oriensvisino regule gastigis Eo-renkontiĝojn, i.a. kvar ĝeneralajn kunvenojn de SES.


Dum iu periodo en B. vivis la denaska kolombia e-isto *Augusto Ochoa* (*1942), licenciito pri filozofio kaj beleto, kiu gastdocentis en la berna universitato pri la kulturo de la kolombiaj indianoj (1983).



Bernaj esperantistoj: Anna-Bertha Gerber, Dora Hemmann, Margrit Guldin



Ueli Hänni, Fritz Wassmann, Daniel Ruchti



Hans Herrmann, Augusto Ochoa

En 1978 la gazeto *Brückenbauer* (20.10.) skribis pri la berna ES, kaj en 1981 la berna gazeto *Der Bund* (08.10.1981) raportis pri la 75-jara jubileo de la berna ES, menciante la problemon de la manko de junaj fortoj. Do

post sufiĉe multeventaj tempoj komence de la 2000-jaroj la aktivecoj de la bernaj e-istoj elĉerpiĝis. La nomoj malmultas: *Daniel Ruchti* (*1957), e-isto de 1982, estas la formala prezidanto de la loka ES, *Ueli Haenni* (*1955), kuracisto, oficas kiel ĝia kasisto. Franz Trachsel, iama kasisto, kaj Ernesto Gadiant (*1956), kuracisto, kiu eklernis Eon en 1984, estas aliaj iamaj membroj. Pri la problemoj de la aplikado de Eo en lernejoj iom okupiĝis Fritz Wassmann, ĵurnalisto, instruisto, ekologo kaj biologo. En Ittigen/BE loĝas →Bruno Graf (*1928), kaj en 1996 →Andreas (Andy) Künzli (*1962) translokiĝis de Kriens/LU al B. por vivi kaj labori en la svisa ĉefurbo.

En B. loĝas ankaŭ *Willy Nüesch* (*1927), la tradukanto de la antropozofia verkaro de Rudolf Steiner (1861-1925) kaj de verkaĵoj de Goethe, Schiller, Novalis, Morgenstern, C.F. Meyer, Mörike k.a. (→Kristanoj)

Pro la centra situo de la svisa ĉefurbo en B. tre ofte okazis la ĝenerala jarkunveno de SES (23 fojoj ĝis la jaro 2003) kaj aliaj gravaj Eo-renkontiĝoj. (→Svisa Eo-Societo)

En la lastaj jaroj SES-anoj okazigis diversajn kunvenojn en restoracio Galaxy. La 23an de oktobro 2004 tie povis esti oficiale prezentita al la Eo-komunumo kaj transdonita al CDELI sufiĉe peza Zamenhof-memortabulo el metalo, kiu estis trovita en la eksa hotelo Beau-Site, kie hodiaŭ troviĝas kliniko. La heredantoj mesaĝis tiun novaĵon al SES post vendo kaj malplenigo de la domo (vd. *SES informas* 4/2004).

Kantono: En decembro 1904 en *Biel-Bienne* okazis prelegoj pri Eo sub la direkto de la loka komercista societo kaj la esenca influo de pastoro Schneeberger kaj de ties frato Paul, kiu aliĝis en la 10a nomaro de la SES-anoj (julio 1904) por fariĝi prezidanto de la loka EG. →Friedrich Schneeberger starigis en 1904 aŭ 1906 la EG en *Laufen* (kasisto estis pastro Walther Herzog), antaŭ ol transiri al la Ido-movado.

Dum la 1930aj jaroj aperis en Biel-Bienne la nomo Michail Miltscheff, apotekisto; en la 1940aj jaroj funkciis EG *Konkordo*, aktivuloj estis *Willy Voirol-Reichen*, librotenisto, kaj lia frato. En 1971 la biela EG anoncis la ĉesigon de sia ekzistado. En 1956 la instruisto →*Marcel Erbetta* (1911-96), UEA-delegito en


Biel-Bienne, lanĉis la interlernejan projekton → *Grajnoj en vento* kun la celo vivigi la internacian korespondadon inter gelernantoj per Eo. En Biel-Bienne estis fonditaj en 1958 ankaŭ la organizo → Eo-Edukistaro de Svislando (EES) kaj en 1968 → Kultura Centro Esperantista (KCE), esence fare de la EES-anoj. Unu el la motoroj de EES kaj KCE tiam estis → *Olivier Tzaut* (*1935), kiu dum multaj jaroj laboris kiel bazlerneja instruisto en Mont-Soleil/BE. En La Combe du Pelu (komunumo La Ferrière/BE) en la Berna Ĵuraso okazis en la 1960aj jaroj tutsemajna porinstruista Eo-staĝo, aranĝita de la instrudepartemento de la berna kanton kaj gvidata de → *Claude Gacond*. Ekde la 1980aj jaroj en Biel-Bienne Eo estis propagandata de → *Serge Reverdin* (*1942), kiu mem nomas sin Parzival’.



Hans Moser, Lilly Schaerer kaj Friedrich Uhlmann



La domo en Häbernbad kaj s-ino Schaer en 1949



Marcel Erbetta inter klasanoj kaj Serge Reverdin

En Biel-Bienne la ĝenerala jarkunveno de SES okazis kvin fojojn: 1911, 1924, 1925, 1938 kaj 1959. En *Langenthal*, kie vivis → *Lilly Schaerer* (1905-2001) kaj Hans Moser (1923-89), iamaj UEA-delegitoj, la SES-kunveno okazis du fojojn (1941 kaj 1958), aliloke en la berna kanton kvar fojojn (en La Neuveville 1942, en Häbernbad 1949 kaj en Gwatt en 1972 kaj 1973). En Häbernbad (komunumo Huttwil) okazis Eo-ferio-semajnoj ĉe familio Schär.

La aŭtoritatoj de la franclingva komunumo La Neuveville eldonis Eo-lingvan poŝtkarton, kiu estis vendata favore al la familio Zamenhof, kiu dum la milito estis trafita de grandaj malfacilaĵoj. En La Neuveville/BE loĝis → *Jules Gilliard* (1901-62), kie li estis UEA-delegito.

En 1907, dank’ al la klopodoj de → *Friedrich Uhlmann* (1881-1938), en Huttwil/BE komenciĝis Eo-kurso kun 52 anoj kaj estis fonditaj eĉ du EG. Sub la kompetenta ĉefredaktado de Uhlmann aperis dum 1910 en Huttwil la profesie produktata Eo-periodaĵo *Vespera Horo*. En 1909 kun la helpo de → *Jakob Schmid* fondiĝis EG *Burgdorf*, kies ĉefaj aktivuloj nomiĝis → *Wilhelm Haase-Meister* (1885-1969) en *Burgdorf/BE* kaj *Ernst Krenger* (1883-1963) de EG *Progreso* en *Utzenstorf/BE*. Pere de la EG en *Hasle-Rüegsau/BE* Haase konatiĝis kun sia edzino Klara Meister (1882-1968), kiu ankaŭ fariĝis fidela e-istino. La unua mondmilito ĉesigis la Eo-aktivecon de Krenger, kiu nur en 1947 revenis al la Eo-movado. Kiel delegito de UEA servis iu Max Schafroth, kiu estis kunlaboranto de *Bibliografio de Internacia Lingvo* (1929).

En *Langnau i.E.* iu J.R. Camenzind enkondukis Eon en la internacian edukinstituton, kiu allogis gejunulojn ankaŭ el eksterlando. En Langnau mortis en 1968 la fervora e-isto *Erwin Zuber*.

Ekzistis EG ankaŭ en *Münsingen*, *Melchnau*, *Sumiswald* kaj *Langenthal*. Krom la menciitaj EG funkciis ankaŭ EG en *Lyss* (gvidata de Albert Rohrer kaj Ernst Scheurer), ĉi-urbe

vivis la apotekisto Fritz Müller (1867-1940). Li estis vicdelegito de UEA en Lyss, poste delegito en Cortaillod/NE.

En Thun la ĉefa aktivulo nomiĝis → *Fritz Schwarz* (1882-1969), kiu servis al la loka EG kiel ĝia kasisto kaj responsulo pri lingvo-ekzercoj kaj kiu estis la arkivisto de SES. Kiam en 1943 li reaperis en la Eo-movado, li ekoficis kiel UEA-delegito en Thun. Kune kun la konata publika personeco → *Arnold Bohren* (1875-1957), kiu estis ĝis 1942 direktoro de la Svisa Asekurejo kontraŭ akcidentoj (SUVA) en Lucerno, Schwarz entreprenis kelkajn varbagadojn, ekzemple la eldonon de turisma Eo-prospekto pri Thun (1952).




Klara Meister-Haase kaj Wilhelm Haase en 1914, Fritz Schwarz kaj Arnold Bohren

En *Uetendorf* apud Thun vivis kaj laboris kiel kuracisto ekde 1921 *Oskar Huber* (1890-1959), filo de berna astronomo kaj matematika profesoro. Huber lernis Eon kiel gimnaziano. Dum 25 jaroj li estis la gvidanto de EG Thun. Li partoprenis la bernan UK en 1913 kaj priskribis siajn memorojn en artikoleto en *Svisa Espero* (marto 1959).



Gérard Cool kaj Florence Côté-Cool



Broŝureto pri Thun en Eo

Inter 1956 kaj 1977, sub la gvido de → *Claude Gacond* kaj aliaj gejunuloj, en Adelboden (Berna Oberlando) disvolviĝis dum entute 21 fojoj la novjaraj skiferioj de EJS kaj EES. Temis pri aranĝo, kiu allogis ĉefe junajn e-istojn por praktikadi la lingvon kaj helpi aliajn agadojn de EES, KCE ktp.

En Goldern-Hasliberg/BE longe vivis *Gérard Cool* (*1921), nederland-devena gimnazia instruisto pri matematiko, kiu pasigis sian tutan profesionan karieron en alternativaj lernejoj. Kiel e-isto (de 1947) li instruis ankaŭ Eon en la privata lernejo *L'école d'humanité* (1948-51 kaj 1963-87). Ĝia direktoro *Paulus Geheeb* (1870-1961) mem praktikis Eon. Lia kanada edzino *Florence Côté-Cool* (*1931), e-istino de 1967, transprenis inter 1979 kaj 1986 la oficon de la ĉefdelegito de UEA kaj A-komitatanino por Svislando. La paro nun vivas en Leibnitz, Aŭstrio.

Dante BERTOLINI

1911-1998



Post la gimnazio B., filo de italo kaj de svisino, frekventis lignajistan metilernejon, antaŭ ol eniri la kantonan porinstruistan lernejon por akiri la licencon pri instruado en baza lernejo. 1931-50 tion li faris, unue en la montaro kaj fine en Locarno/TI. Ekde 1936, dotita per poeziema animo kaj instigita de Giuseppe Zoppi (1896-1952), siatempe fama itallingva verkisto en Tiĉino, B. fariĝis konata ĉe la publiko unue kiel aŭtoro de itallingvaj poemoj, kiuj aperis en tiĉinaj gazetoj; por la unua poemkolekto *Voci e bisbigli* (1935) li ricevis la premion Schiller. En 1937 sekvis premio de la Societo de svisaj verkistoj por alia poemaro titolita *Licheni*. 1937-38 B. studis literaturon en la universitato de Romo per stipendio de la tiĉina kanton. 1950-71 li deĵoris kiel lerneja inspektoro de la tiĉina kanton. Dum sia aktiva porlerneja periodo B. verkis 35 klasikajn pedagogiajn legolibrojn, kiuj estis tre popularaj en Tiĉino kaj agnoskitaj kiel oficialaj instruiloj. Surbaze de liaj libroj almenaŭ tri generacioj de tiĉinanoj lernis legi. Dum tri jardekoj B. aktivadis ankaŭ kiel politikisto sur loka kaj urba niveloj kadre de la liberala partio; 18 jarojn li oficis kiel membro de la komunuma administrejo de Locarno. Krom tio li okupis funkciojn en diversaj societoj. Dum lia propra familio havis originon laboristan, la influo bofamilia estis socialistema. Lia edzino Nora Varesi estis la filino de konata socialista kuracisto en Locarno.

La unuan kontakton kun Eo B. havis komence de la 1960aj jaroj pere de →Edmond Privat, kiu instruis la francan kaj anglan


lingvojn kaj literaturojn en Tiĉino. Post la morto de Privat B. ĉeestis prelegon de →Claude Gacond pri la verko *Aventuroj de pioniro* de Privat, partoprenis Eo-kurson de Irene Molinari en la Migros-lernejo en Locarno kaj aliĝis al tutsemajna porinstruista Eo-staĝo en la Berna Ĵuraso, kiun iniciatis la instru-departemento de la berna kanton sub la gvido de Claude Gacond. Dum tiuj okazoj B. malkovris la Eo-literaturon, precipe ties poezion kaj mem fariĝis Eo-poeto. El tiu verkemo rezultis la volumoj *El la nova ĝardeno / Dal nuovo giardino* (1979 kaj 1985) kaj *In quest'era omicida / En ĉi murdepoko* (1987). En 1983 B. tradukis la libron *Aventuroj de pioniro* de Edmond Privat en la italan lingvon kaj aperigis ĝin en la eldonejo Pedrazzini en Locarno. Krome B. itiligis la porinfanajn poemojn de la novzelanda e-isto Bertram Potts (aperis 1994). Post kontaktoj kun →Kurt Greutert, Alfonso Varini kaj aliaj tiĉinaj e-istoj B. ekaktivis kadre de la lokarna EG (GRESLO), kiel estrarano (vicprezidanto) kaj Eo-instruisto. Dum pluraj jaroj B. eksperimente instruadis Eon en la bazaj (elementaj) klasoj de la porinstruista lernejo. Dank' al la persisto de B. en 1985 la urbestro de Locarno konsentis bapti placon en la kvartalo Solduno je la nomo Piazzetta Esperanto, kiu tiel iĝis la unua Eo-placo en Svislando (ekde la 12a de oktobro 2002 ĝi nomiĝas Piazzetta Dante B.). B. estis membro de SES kaj UEA, en 1986 li estis akceptita ankaŭ de Esperantlingva Verkista Asocio (EVA). Kvankam B. alte taksis la kulturalan valoron de Eo kaj respektinde kontribuis al la diskonigo de Eo en Tiĉino, lia unua klopodo ĉiam estis defendi la italan lingvon en la tiĉina kanton kontraŭ aliaj influoj damaĝantaj al ĝi. La tiĉina gazetaro de tempo al tempo raportis pri li kaj lia agado.

→Tiĉino →Politiko →Instruado →Bibliografio

BIBLIOTEKOJ KAJ EKSPozICIOJ

La ideo starigi Eo-bibliotekon en Svislando unuafoje esprimiĝis en *Svisa Espero* (SE), oficiala organo de SES, en ĝia n-ro 4-5/1905. En 1908, laŭ propono de →Eduard Stettler, vicprezidanto de SES, fondiĝis *Svisa Esperanta Biblioteko* (SEB) kun la celo

kolekti ĉiujn svisajn esperantaĵojn kaj la plej interesajn verkojn kaj revuojn el eksterlando. La biblioteko estu je la dispono de la instruistoj, tradukistoj kaj amikoj de la Eo-literaturo. Laŭ la regularo de la biblioteko, datita je la 22a de decembro de 1908 kaj publikigita en *SE* 1/1909, SEB estis posedaĵo de SES, kiu donis jaran subvencion („laŭpove”) kaj nutris ĝin per presaĵoj alvenantaj al la oficejo. La societo instalas bibliotekan komitaton kun prezidanto (→Friedrich Uhlmann), vicprezidanto (→René de Saussure), bibliotekisto (Eduard Stettler), sekretario, kasisto, helpantoj. La pruntado okazis ankaŭ perpoŝte.



Eduard Stettler (maldekstre) en Soloturno 1909

Laŭ raporto de Stettler de oktobro 1909 la kolekto havis tiam pli ol 800 „numerojn” kun pli ol 150 binditaj volumoj. En *SE* en februaro 1909 estis menciite, ke la kolekto valoris pli ol 350 svisajn frankojn (kiel komparo: simpla UEA-membreco inkluzive kun *Jarlibro* kostis 2.50 frankojn). Inter la donacintoj de multaj libroj kaj gazetoj estis menciita speciale René de Saussure. Ĉar

Stettler en 1909 translokiĝis por du jaroj al Ĝenevo por kunlabori kun la CO de UEA, evidente ne restis tempo por la prizorgado de la biblioteko, kaj ŝajnas, ke pro interesomanko oni ankaŭ ne povis trovi anstataŭanton aŭ posteulon por ĝia priokupo. Tial aperis la plano cedi la bibliotekon al UEA kun daŭra rajto de la svisoj uzi ĝin kaj kun la kondiĉo, ke la biblioteko restu en Svislando kaj ke UEA garantiu materian helpon. SES, kiu konsentis fariĝi t.n. garantianto de UEA, kvazaŭ vendis sian bibliotekon al →Hector Hodler, kunfondinto de UEA, en 1912 aŭ 1913. Samtempe stariĝis la t.n. Universala Esperanta Librejo de UEA por la membroj de la asocio. Malgraŭ tiu solvo, la svisaj e-istoj evidente sentis la bezonon je propra biblioteko. Tiucele en februaro 1914 aperis informoj pri nova projekto kun la nomo *Svisa Esperantista Biblioteko*. Montriĝis ke temis kvazaŭ pri la daŭrigo de la unua biblioteko. Kiel responsulo pri la biblioteko estis elektita Ernst Krenger el Utzenstorf (→Berno), kiu por ĝi pretis disponigi lokon en sia privata loĝejo. La unua katalogo aperis en *SE* 8/1916. Fakte nur tre malmultaj e-istoj mendis librojn kaj ilin eĉ ne resendis, kiel estis notite.



Foto de la biblioteka ĉambro en la Centra Oficejo en Ĝenevo en 1920. Ĉi tiu foto estis presita en la reklambroŝuro *Universala Esperanto-Asocio en la juĝo de la esperantistoj*, Genève 1923.

Kiam en 1912 →Hans Jakob komencis labori en la CO en Ĝenevo, li ekprizorgis ankaŭ la libroservon kaj la bibliotekon, kiu troviĝis nun en privata posedo de Hodler kaj kiu ampleksis proksimume 900 bibliotekerojn en

kestoj. De Hodler, kiu mortis en 1920, estis ricevita modesta sumo por novaj akiroj. Kiam pro la malsano de Hodler Stettler fariĝis nova direktoro, en 1919 la oficejo - kaj kun ĝi evidente ankaŭ la biblioteko (kiu ne estis tre granda) - translokiĝis por kelkaj monatoj al Berno. Post la morto de Hodler la vidvino Emilie Hodler-Ruch cedis la rajtojn al Stettler i.a. je la gazeto *Esperanto* kaj je la biblioteko (kiu tiam ampleksis inter 3000 kaj 4000 erojn). En 1920 la oficejo sub la gvido de Jakob reiris al Ĝenevo. Ekde 1924 la biblioteko ricevis subvencion de UEA, en 1926-30 pri la biblioteko surloke okupiĝis Petro Stojan el Ruslando, la kompilinto de *Bibliografio de Internacia Lingvo* (1929). 1931-33 okupiĝis prie →*Henri Vatré*.

La nova statuto (januaro 1934) starigis por la biblioteko la eblon de pruntedona servo, kiu tamen neniam reale funkciis. Lige kun la internaj kvereloj en UEA, kiuj kondukis al la fama disiĝo inter UEA kaj IEL (1936-47), Stettler kaj Jakob dume forlasis siajn postenojn kaj la biblioteko iĝis neglektata. La planojn transloki la bibliotekon ekster Svislando, konkrete al la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) kadre de la Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno laŭ propono de IEM-direktoro Hugo Steiner, Jakob, apogata de iuj samopiniantoj, kontraŭstaris per jura proceso. Eĉ Lidja Zamenhof protestis kontraŭe. Ekde 1937 la ĝeneva UEA ricevis novan sidejon en Palais Wilson, domo en kiu rezidis diversaj internaciaj organizaĵoj. Pro la timo, ke la germana armeo dum la dua mondmilito povus transpaŝi la svisan limon, Jakob preferis konservi la bibliotekon sub sia protekto. En aprilo Jakob 1940 sondis ĉe Alice V. Morris de International Auxiliary Language Association (IALA), ĉu usonaj publikaj bibliotekoj estus interesataj transpreni la UEA-bibliotekon. Kiam en 1942 Jakob trovis laborpostenon en ŝtata oficejo kaj Palais Wilson transiris al kantona posedo, Jakob restis kun sia Eo-oficejo en la malnova ĉambro, kie la enpakita biblioteka materialo deponiĝis. En julio 1946 la reprezentantoj de IEL kaj de la ĝeneva UEA interkonsentis en Berno pri la reunuigo de ambaŭ asocioj (Heronsgate ricevis la Administran Centron, dum la ĝeneva oficejo daŭrigis funkcii sub la titolo Serva Centro). Jakob havis la taskon

krom prizorgi diversajn aferojn de UEA ankaŭ redakti la novan komunan asocian organon *Esperanto* kaj okupiĝi denove pri la biblioteko. En 1948 la biblioteko oficiale ricevis la nomon de Hector Hodler (ekde la statuto de 1980 ĝi nomiĝas Biblioteko Hector Hodler).

Ĉar la biblioteko en Palais Wilson estis malfacile alirebla, UEA refreŝigis sian intencon ŝanĝi la ejon por la biblioteko, unue al Londono, kio ne montriĝis taŭga, poste finfine al Roterdamo, kien la CO translokiĝis el Heronsgate en novembro 1955. Lige kun biblioteka inventaro en 1956, pluraj personoj el la UEA-ĉirkaŭaĵo kiel Rüdiger Eichholz aŭ estrarano Ivo Lapenna (kiu en 1952 fondis, kadre de UEA, sian Centron de Esplorado kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo CED), komencis interesiĝi pri la sorto de la ripozanta arkivo kuŝanta en la ĝeneva kelo. Lapenna rifuzis havigi la bibliotekon al muzeo. Nun la diskutoj ĉirkaŭ la biblioteko Hodler evoluis pli kaj pli al la 'kazo Jakob'. La premo flanke de UEA, ke parto de la biblioteko aŭ ĝia tuto finfine migru al Roterdamo, kreskis. En 1956 la UEA-komitato esprimis la deziron, ke la biblioteko estu laŭeble konsultebla ĉe la ĉefsidejo de la asocio. Lige kun la kontrolado de la kontoj en la librotenado ĉe Jakob ekde 1960 estis konstatitaj diversaj malregulaĵoj en la kalkuloj de la ĝeneva Serva Centro. Jakob ja konfesis, ke li vendis propradecide iujn posedaĵojn de UEA, i.a. ankaŭ librojn kaj duoblaĵojn el la biblioteko, sen informi la estraron. Tion li faris por pagi oficejajn elspezojn. Parto de la biblioteko plus aliaj dokumentoj restis do post somero 1960 krom en la kelo de Palais Wilson ankaŭ en la privata loĝejo de Jakob mem. Post malbelaj incidentoj, en kiuj la homoj el Roterdamo kaj Jakob akuzadis sin reciproke (→Universala Esperanto-Asocio), Jakob konsentis transdoni la bibliotekon kaj ceterajn havaĵojn al Roterdamo, dum la privataj arkivaĵoj de Jakob povis, post novaj gravaj perturboj kaj helpe de →Henri Vatré, esti savitaj de →Claude Gacond nome de →CDELI.

En 1944 la CK de SES taskis iun A. Egg funkciigi *Svisan Eo-Arĥivon (SEA)* kun la celo fariĝi „universala informejo” pri la svisa movado. La taskoj estis jenaj: kolekti la

revuon *Svisa Espero* kaj aliajn revuojn kiel eble plej komplete; kolekti cirkulerojn, flugfoliojn, librojn, broŝurojn eldonitajn en Svislando; arkivigi la statutojn kaj dokumentarojn de ĉiuj svisaj EG; esplori la historion de iamaj lokaj movadoj, konsultante malnovajn e-istojn kaj aliajn personojn. En SE 7/1944 estis anoncita la fondo de *Svisa Esperanto-Biblioteko*, kiu alvokis la lokajn grupojn, kiuj posedas bibliotekon, disponigi siajn librojn al la membroj de SES. La motivo de tiu pruntoservo estis instigi precipe la izolitajn e-istojn legi Eo-librojn por la propra kleriĝo. La kunordigon de tiu servo transprenis Hélène Reymond en Vully/VD. En 1952 bibliotekisto de SES fariĝis → *Fritz Schwarz*, kiu kompilis katalogon pri la konsisto de la arkivoj de SES.



Legosalono de la Biblioteko Hector Hodler en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo

Sufiĉe ampleksan privatan bibliotekon posedis → *Karl Jost*, pri kiu eĉ estis farita studo por akiri la diplomon de bibliotekisto (*Blenda Oeberg, Cataloguement de la bibliothèque Espéranto Karl Jost. Travail présenté à L'École des Bibliothécaires pour l'obtention du Diplôme. Genève, février 1955*). Antaŭ sia morto Jost testamentis sian Eo-libraron al la centra universitata biblioteko de Zuriko.

Kiam en la dua duono de la 1950aj jaroj → *William Perrenoud* estis prezidanto de SES, li prezentis planon pri starigo de Centra E-ista Biblioteko. Sed la kontaktoj kun la biblioteko de la urbo Neuchâtel montriĝis vanaj kaj do la plano ne realiĝis.

Koncerne la sperton kun privataj Eo-bibliotekoj *Claude Gacond* protokolis jenajn observojn: La konsultado ekzemple de la biblioteko de la neŭŝatela EG estis problemo. Oni devis veturi al la dommastruma instituto *Monruzy* situanta ekster la urbo, kaj alvenante tie, oni sentis, ke malgraŭ ilia samideana afableco oni iel ĝenas ges-rojn → *René-William* kaj *Nadine Perrenoud* en ties pedagogia aktiveco. Manko de katalogo kaj senprincipa ordigo de libroj malfaciligis ties esploradon. La biblioteko mem estis sufiĉe riĉa, sed ĉar ĝi konsistis antaŭ ĉio el libroj kaj revuoj apartenintaj al la patrino de *René-William Perrenoud*, al la Eo-pioniroj → *Jean Wenger* kaj al → *Georges Stroele*, mankis aktualaĵoj. *Gacond* preferis konsulti la bibliotekon de → *Jules Gilliard* en *La Neuveville/BE*. Lia biblioteko eble estis malpli riĉa, sed pli kohere ordigita, do multe pli facile konsultebla, kaj bibliografie pli aktuala. La strebado solvi tiujn kaj aliajn konsiderojn supre priskribitajn kondukis al la starigo de → *Centro de dokumentado kaj esploro pri la lingvo internacia (CDELI)* kadre de la urba biblioteko en *La Chaux-de-Fonds/NE*. La kolektado komenciĝis en 1954 laŭ iniciato de → *Claude Gacond* (*1931); CDELI estis statute oficialigita en 1967.



Suda flanko de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds (fotis A. Künzli).

Aliaj Eo-B. en Svislando: Ceterajn, laŭ amplekso kaj kvalito diversajn kolektojn de Eo-libroj posedas la svisaj lokaj Eo-grupoj, se ili ne jam transdonis ilin al CDELI aŭ aliaj bibliotekoj, kaj kelkaj esperantologie aŭ interlingvistike interesataj privatuloj.

La bulteno *Kuriero de Esperanto* publikigis en 1999 la katalogon de la biblioteko de ES Basel.

Ekster la Eo-movado la plej signifajn kolektojn de Eo-literaturo posedas la urbaj kaj universitataj bibliotekoj de Berno, Bazelo kaj Zuriko kaj la Svisa Nacia Biblioteko en Berno; same en la biblioteko de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo troviĝas kolektoj ligitaj al Eo.

En la Occidental-revuo *Cosmoglotta*, n-ro 51/1972, oni povis legi, ke „la centra biblioteko de Zuriko detruis aŭ vendis kiel makulaturon enorman kvanton de Volapük-literaturo ekstreme rara kaj /ne?!/ trovebla aliloke, sole ĉar ĝi bezonis spacon por aliaj aferoj.“

Ekspozicioj en publikaj B.: Lige kun la temo B. estas notindaj ankaŭ la Eo-ekspozicioj, kiuj estis instalitaj en diversaj grandaj publikaj bibliotekoj de Svislando.

Berno 1953: En la Svisa Nacia Biblioteko en Berno de la 19a de oktobro ĝis la 9a de novembro estis instalita, kun la aŭspicio de SES kaj la kunlaboro de →Arthur Baur kaj de la berna EG, ekspozicio pri Eo. La vitrinoj prezentis ĉirkaŭ 300 ĉefe presitajn Eo-dokumentojn. *SE* 5/1953 - kaj la loka gazetarano - detale raportis prie. La inaŭguron ĉeestis diversaj oficialaj reprezentantoj.

La Sagne/NE: En la neŭŝatela vilaĝo La Sagne, kie →Claude Gacond instruis Eon kiel eksperimenton (1956), li organizis Eo-ekspozicion en la lernejo.

Zuriko 1975: De la 17a de junio ĝis la 5a de julio 1975 en la centra biblioteko de Zuriko estis prezentita ekspozicio pri Eo. (raportis *NZZ*, 2.7.1975).

Berno 1979: Ekspozicio pri Eo kaj interlingvistiko en la Svisa Nacia Biblioteko en Berno, aranĝita de KCE kaj CDELI en la kongresa jaro (UK Lucerno). En la realigo de la ekspozicio esence kunlaboris Claude Gacond, István Mórocz (grafiko), Tazio Carlevaro (teksto), Maŭro De Sassi kaj Johannes Jakob Sturzenegger (germanigo). En la diskuto kun la reprezentantoj de la Eo-societo aperis vigla opozicio kontraŭ la temo interlingvistiko, sed fine ĝi estis tamen akceptita (pri la ekspozicio raportis *Der Bund*, 13.1.1979).

Lucerno 1979: Antaŭ kaj dum la 64a UK en Lucerno la centra biblioteko de tiu svisa urbo montris ekspozicion pri Eo. La ekspozicio de la jaro 1979 migradis tra lernejoj, societoj por unu aŭ kelktagaj prezentoj. Samjare →Andreas Künzli aranĝis ekspozicion en la halo de la lucerna gimnazio kaj prelegis en sia klaso pri Eo.

Bazelo 1987: Dank' al la organiza aktiveco de →Erna Döring kaj kunlabore kun KCE kaj CDELI povis esti aranĝita la sama ekspozicio pri Eo kaj interlingvistiko en la biblioteko de la bazela universitato.



Oficiala siglo de la bazela ekspozicio en 1987

En la jubilea jaro de Eo (1987) →Andreas Künzli instalas en la Instituto pri slavistiko de la zurika universitato ekspozicion pri la temo ‘100 jarojn Eo en la slavaj landoj kaj 100 jarojn slavaj literaturoj en Eo’ kaj faris akompanan prelegon antaŭ profesoroj kaj studentoj.

En la urba biblioteko de *La Chaux-de-Fonds* okazis tri gravaj ekspozicioj pri →Edmond Privat: la unua okazis tuj post lia morto, la dua, kiu estis organizita de Pierre Hirsch, estis montrita komence en La Chaux-de-Fonds kaj poste en Neuchâtel. La trian ekspozicion Claude Gacond organizis por la centjara jubileo de Edmond Privat (de la 21a de aŭgusto ĝis 31a de oktobro 1989). Elementoj de la menciitaj ekspozicioj en Svislando de 1979/87 esti utiligataj ankaŭ en analogaj ekspozicioj en Vieno (Aŭstrio) kaj Aalen (Germanio).

2004: Ekspozicioj pri Eo kaj interlingvistiko estis aranĝitaj en Vevey kaj Le Locle kadre de la jubilea jaro de SES, parte per la paneloj de 1979.

Andres BICKEL

*1954. Loĝas en Ĝenevo



B., kiu naskiĝis en Bazelo, finis en 1979 la ĝenevan universitaton per la licencio de juro. Sed li praktikas la profesion de trajnestro ĉe la svisaj fervojoj (SFF). Apude B. aktivadis en diversaj organizoj: Junulara Kristana Unuiĝo (UCJG) en Ĝenevo (1970-74), en la teatra societo Alroma en Versoix/GE (1981-82 prezidanto), en la ĝeneva sekcio de la Subasocio de trajn-akompanistoj ZPV de la Svisa Fervojista Sindikato SEV (1984-87). Li estis membro de la CK de ZPV (1985-87) kaj anstataŭanta redaktoro de *Courrier CFF* (1988).

B. lernis Eon en 1969 ĉefe pro lingva intereso per la perkoresponda kurso de KCE, dum la skiferiado de EJS en Adelboden kaj en kursoj de →Madeleine Stakian (en 1974 li akiris la SES-diplomon pri instrukapablo, kaj en 1994 li trapasis la mezgradan ekzamenon de ILEI/UEA). En 1974 B. kunfondis la ĝenevan junularan EG, li estis komitatano de la ĝeneva EG La Stelo, prezidanto de SEJ, redaktoro de *Hej!*, de la ĝeneva *Brasikfolio* (1974-78), de la informilo *Espéranto-Réalités* (ĝis 1985), kaj de *SER* (1988-90). Dum la 59a UK (Hamburgo 1974) B. ricevis la 3an premion en la oratora konkurso de UEA. En 1977 li starigis, kun aliaj, la teatran kaj kantan trupon La Vagabondoj, en kiu li mem aktive partoprenis kiel aktoro. En 1982 li troviĝis ankaŭ inter la kunfondintoj de Centre genevois d'information sur l'espéranto. Krome li oficis kiel junulardelegito de UEA (1975-78) kaj estis ano de Internacia Eo-Asocio de juristoj (1978-87). B. kunlaboradis kun la laŭzana ES, SES, KCE, LF-koop kaj →Esperanta Civito. Li organizis multajn Eo-aranĝojn,

gvidis informstandojn, realigis informvesperojn kun ekspozicioj, partoprenis en radio- kaj televideo-elsendoj kaj instruis/as Eon en diversaj okazoj. Lian agadon subtenas lia edzino *Camille Bickel-Perrin*. Ankaŭ liaj infanoj komprenas Eon.

→Ĝenevo →Junularo →Familioj

Friedrich BIERHOFF

1886-1988



Post la gimnazio en Hagen (ĉe Wuppertal/Germanio) B. eklaboris ĉe la Reĝa Prusa Fervojo, deĵorante en Rejnlando kiel staciestro kaj poste kiel fervoja inspektoro. Post sia anticipa pensiigo, li vivis dum duonjaro ĉe siaj gepatroj en suda Brazilo. Ĝis 1938 la familio rezidis en Kreuzlingen/TG, kie oni mastrumis agrikulturan bienon. Ankaŭ dum la dua mondmilito B. deĵoris ĉe la fervojo, ĉi-foje en la stacidomo de Leipzig. Post la detruo kaj okupado de la urbo la familio translokiĝis al Konstanco en suda Badeno, kie B. partoprenis la laboron kadre de malgranda plasto-entrepreno. En 1957 oni definitive instaliĝis en Döttingen/AG. B. dediĉis sian tempon hodie ankaŭ al biokemio, en kiu li rikoltis grandan sperton kaj kiun li utiligis por helpi al suferantaj homoj.

Kiel fervora e-isto B. vizitis multajn landojn kaj vigle partoprenis movadajn aranĝojn ĝis sia 93a jaraĝo. Precipe dum la Eo-Feriosemajno de SAEF li montris ĉiam grandan intereson plustudi Eon en superaj lecionoj. Laŭaĝe B., kiu oficis kiel UEA-delegito en Döttingen dum la 1960-80aj jaroj kaj kiu estis ankaŭ ano de SES kaj SAT, estas konsiderata kiel la plej maljuna e-isto iam vivinta en Svislando (102-jara). La loka

gazetaro omaĝis lin okaze de jubileaj revenoj de lia naskiĝtago.

Hans BIPP
1913-1997



Post la trafika lernejo en St. Gallen (1931-33), kie li lernis la profesion de stacidoma oficisto, kaj post duonjara restado en Londono por perfektigi sian konon de la angla lingvo, B. deĵoris en diversaj stacidomoj en Romandio (1936-39). Reveninte al alemana Svislando, li fariĝis estro de informoficejo en Zuriko kaj enposteniĝis en la ĝenerala direkcio de SFF (svisaj fervojoj) en Berno kiel administra oficisto.

B. lernis Eon en 1929 en St. Gallen pere de →Rudolf Gottlieb Maeder. Post la dua mondmilito li restarigis SAEF, kies aktivulo li estis de 1932, kreante provizoran estraron kun Emil Keiser, transformante la tiaman SAEF-amikaron al organizita societo kaj serĉante kontakton ankaŭ kun gekolegoj el aliaj lingvopartoj de Svislando. Kadre de SAEF B. plenumis la funkciojn de kasisto (1950-52), prezidanto (1952-56), vicprezidanto (1956-58), asesoro (1958-69) kaj komisiito (1969-72). Dum la 50aj jaroj li gvidis Eo-kursojn en la zurika stacidomo. Internacie B. partoprenis la agadon de IFEF kaj ties kongresojn ekde la unua en Aarhus en 1949, kunorganizis la IFEF-postkongreson en St. Gallen (1953) kaj estis la prezidanto de LKK de la 7a IFEF-kongreso en Zuriko (1955). 1975-89 li kunlaboris en la terminara komisiono de IFEF por traduki la seslingvan *Ĝeneralan Vortaron de Fervojaj Terminoj* de *Internacia Fervoja Unuiĝo* (IFEF eldonis la

Eo-verkon en 1989). Laŭ inspiro de francaj kolegoj en 1952 B. sugestis la fondon de Svisa Unuiĝo arta kaj intelekta de fervojistoj (UAISF), kies unua vicprezidanto li fariĝis sub prezidanto Emile Birbaum, kiu estis simpatianto de SAEF kaj de la Eo-movado. En ĉi tiu organizo B. estis estrarano kaj delegito ĝis 1972, kiam oni nomis lin honora membro. Okaze de la 50-jara jubileo de SAEF (1975) B. verkis kun →Kurt Greutert legindan skizon pri la historio de SAEF, kiu estis publikigita en *Svisa Fervojisto* (n-ro 78/1975). En 1994 B. estis nomita honora membro ankaŭ de SES.

→Fervojistoj

BLINDULOJ

La unua raporto *Jahresbericht des Schweizerischen Central-Vereins für das Blindenwesen*, kiu estis verkita en 1904 de iu s-ro V. Altherr, sekretario de la svisa blindula asocio, entenis favoran mencion pri Eo. La franc-svisa e-isto Théophile Cart (1855-1931) redaktis dumonatan revuon en brajla skribo kaj faris raporton pri Eo ĉe blinduloj dum la 2a UK en Ĝenevo (1906), kie ĉeestis la unuaj blindaj kongresanoj.

La vaŭd-devena e-isto *Henri Dor* aktivis ekde 1860 en Vevey kiel okulkuracisto antaŭ ol li translokiĝis al Liono en 1876.

Kiel *EdEo* notis, supozeble unu el la plej fruaj blindaj instruistoj en la mondo (dum la lernojaro 1895-96) nomiĝis *Hélène Giroud*, kiu naskiĝis en 1867 en Bazelo kaj gvidis blindulan lernejon en Liono (Francio). Samtempe kiel unua aktiva blinda e-istino ŝi lernis Eon en 1895 sen lernolibro, verkis libreton en la brajla skribo, instruis kaj propagandis Eon inter blinduloj. La blinda hungar-devena ĝenevano kaj profesia pianludisto *Jenö Lenyei* (1921-88) lernis Eon kiel junulo en 1934, aliĝis al Ligo internacia de blindaj e-istoj, praktikadis Eon dum la tuta vivo kaj estis aktiva membro de la ĝeneva EG La Stelo. Rosa Vogt (1879-1948) el Laŭzano kopiis kun la helpo de blinda samideano la Eogramatikon en brajlskribo. En 1948 SE aperigis alvokon de Theo Kutzli en St. Gallen al la vidantaj homoj kunlabori kun blinduloj, interamikiĝi kun ili pere de la lernado de la brajla skribo kaj korespondante kun ili en Eo.

Por ke la svisaj blindaj e-istoj pli facile akiru sonbendlibrojn, estis fondita en 1962 speciala Eo-lingva sonbenda biblioteko. La motoroj de tiu agado estis Karl-Heinz Mischler en Zuriko kaj Antonio Pellanda en Winterthur.

Gravan rolon por nevidantoj ludis la sonbenda servo de SRI, kiu estis senpage disponigita de la direkto de la radiostacio kaj ofertis la prelegojn de →Arthur Baur kaj →Claude Gaccond.

En aŭgusto 1965 okazis en Gwatt apud Thun internacia renkontiĝo de blindaj e-istoj kiel rekompenco por tiuj samideanoj, kiuj ne povis viziti la UK en Tokio.

En la 1970aj jaroj funkciis *Svisa Unuiĝo de blindaj e-istoj*, kies prezidanto estis *Giovan'Antonio Pellanda*.



Henriko Fischer

Kiam la rumana Eo-pioniro →*Henriko Fischer* (1879-1960) kaj lia edzino blindiĝis en sia ekzilo sur la insulo Kipro, Andreo Cseh kolektis monon por venigi la du blindulojn al Ĝenevo, kie pluraj operacioj povis redoni al Henriko iugradan vidkapablon. Ekde 1950 la paro loĝis kiel rifuĝintoj en La Tour-de-Peilz/VD, kie la laboremo de Fischer, kiu estis membro de SES kaj de la tiama EG Vevey, reaperis malgraŭ invalideco.

Alia migrinto kun simila sorto kiel Fischer nomiĝis *Michael Wittenberg* (1881-1954), kiu naskiĝis en Ruslando, kie li studis minejan teknikon kaj kie li laboris kiel gazet-redaktoro. En Berlino li studis politikan ekonomion kaj juron, reiris al Ruslando en 1914 kaj translokiĝis al Parizo en 1933. Ĉ. 1924 li ekinteresiĝis pri Eo kaj aliĝis al UEA kaj ISAE. En 1935 li estis elektita kiel direktoro de UEA, sed ĉar li ne ricevis

restadpermeson en Svislando, li restis en Francio. En 1940 lia familio devis fuĝi al suda Francio. En 1942 li venis al Svislando kiel rifuĝinto. Dum Wittenberg mem blindiĝis, li povis daŭrigi sian laboron, i.a la tradukadon de la *Taglibro de Anne Frank*, kun la helpo de sia rusa edzino *Ida Novikoff* (1887-1976). Li ofte faris, preskaŭ blinda, interesajn prelegojn en la loka ES (evidente en Zuriko), dum ŝi gvidis Eo-kursojn kaj estis aktiva membrino de SES.

En Lucerno Luciano Ortelli oficis spite al sia blindeco kiel kluba sekretario inter 1961 kaj 1976.



Michael Wittenberg kaj Ida Novikoff

Nuntempa aktiva blindulo, kiu eklernis Eon aŭtodidakte en 1965 kaj kiu sufiĉe bone regas tiun lingvon, estas la zurikano *Martin Meyer* (*1947). Profesie li helpas al blinduloj trovi manieron vivteni sin kaj tiucele kontaktas kun lernejoj, paroĥaj grupoj, oldulaj cirkloj ktp. Kvankam Meyer akiris la abituriantan diplomon, li ne trovis la okazon fini siajn universitatajn studojn en Zuriko (ĉefe pri pedagogio kaj psikologio), ĉar li devis serĉi manierojn por vivteni sin.

Fondita en 1950, la *Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE)* celas disvastigi Eon inter blinduloj kaj liveri informojn al blindaj e-istoj en brajla skribo aŭ en la formo de sona dokumento.

Hector BOFFEJON

1901-1983




En 1972 en la urbeto Sempach/LU ekloĝis la aktiva flandra e-isto B. Sekve li komencis vizitadi la lucernan EG. En Belgio li laboris unue kiel komercisto kaj poste kiel vicdirektoro ĉe la firmao Ford. Dum la dua mondmilito li aktivis en la belga kontraŭfaŝisma movado, pro kio li pasigis kvar jarojn en diversaj germanaj koncentrejoj (Mauthausen, Dachau). Post sia liberigo li estis honorita de la belga reĝo.

Al la Eo-movado B. aliĝis ĉirkaŭ la jaro 1928, fariĝante tre aktiva e-isto en Belgio. En 1956 li fondis kaj redaktis la periodaĵon *Mondo* kaj funkciigis samnoman eldonejon. Krom tio li kontribuis sur la kampo de la aŭtomobila Eo-terminologio, kunlaborante kun la redakcio de *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) kaj pretigante la manuskripton por propra vortaro. En la diskutoj pri taŭgaj metodoj disvastigi Eon B. laŭdis la agadon de Internacia Instituto por la oficialigo de Eo (IOE), samtempe kritikante la labormetodon de la cetera Eo-movado. B. reprezentis la konvinkon, ke por atingi la oficialigon de Eo kaj ĝian enkondukon en la lernejojn necesus premi la politikajn partiojn, registarojn kaj aliajn naciajn kaj internaciajn instancojn.

→Lucerno →Politiko

Arnold BOHREN

1875-1957



Post la porinstruista lernejo kaj profesia aktiveco kiel instruisto ĝis 1918, la Thun-ano B. studis matematikon kaj fizikon en la universitatoj de Berno kaj Zuriko. 1906-45 li estis honora doktoro, privatdocento kaj honora profesoro pri asekura matematiko kaj pri kalkulado de la probableco en la berna universitato. Samtempe li fariĝis vicdirektoro kaj poste direktoro (1936-42) de Svisa Asekurejo kontraŭ akcidentoj (SUVA) en Lucerno. Kiel socialdemokrato li membris en la urba konsilio de Berno (1908-18) kaj oficis kiel vicdirektoro de la sektoro pri lernejoj kaj mizerulaj aferoj. Li estis ankaŭ membro de la direkcio de la Ruĝa Kruco (1935), estro de la Internacia Altlernejo en Leysin kaj kunlaboranto de pluraj komisionoj sur federacia nivelo (armea administracio kaj asekuro, malrespekto de la neŭtraleco, bombo-damaĝoj, asekuro por maljunuloj ktp.).

En *SE* 7/1952 B. bele raportis kiel li fariĝis Eo-adepto kiel 75-jarulo. Lin influis ĉefe la observo dum internaciaj konferencoj, ke malgraŭ teknike bone funkciantaj tradukiloj la tradukoj al aliaj nacilingvoj estas temporabaj kaj multekostaj. Krome li opiniis, ke la lingvaj diferencoj malebligas la personan kontakton inter la diverslandaj kongresanoj. Ĉar laŭ li nacia lingvo ne taŭgas por forigi tiujn malfacilaĵojn, B. ne dubis, ke sole komuna lingvo kiel Eo, kiu havas laŭ li mirindan logikon kaj estas sufiĉe facile lernebla, povus pozitive kontribui al la solvo de lingvaj problemoj. B. mecenatis kelkajn

propagandajn Eo-agadojn, financante ekzemple la turisman gvidilon pri la urbo Thun, produktitan en kunlaboro kun →Fritz Schwarz, kiu siatempe estis la ĉefa aktivulo en Thun.

→Berno →Politiko

BONTEMLANOJ

Kiel internacia organizo de viroj kaj virinoj, kiuj celas disvastigi la idealojn de alkohol-abstinado, paco kaj frateco, Internacia Organizo de la Bontemplanoj (IOGT) lukta por abstinado rilate alkoholon kaj drogojn kaj aktive okupiĝas pri alkoholaj kaj aliaj drogaj problemoj. Aktiva bontemplano - kaj samtempe pledanto por Eo - en Svislando estis →*Auguste Forel* (1848-1931), al kiu oni dankas tre signifajn kontraŭ-alkoholajn aktivecojn kiel la fondon de la bontempla loĝio Helvetia en Zuriko (1892), la organizadon de kongreso de la bontemplanoj en Bazelo (1919) kaj la fondon de bontemplaj organizoj dise tra Eŭropo, precipe en Aŭstrio, Bulgario, Turkio kaj Tunizio.

B. ludis rolon en la fondo de la zurika ES en 1905.

→*Jules Freymond* (1888-1978) estis signifa aktivulo de la svisa kaj internacia fervojistaj abstinaj movadoj.



Bontempla medalo pri Forel; Hans Bickel (1966)



Eble la plej grava aktiva svisa bontemplano kaj e-isto estis la instruisto *Hans Bickel* (1905-95), kiu agadis en la junulara bontempla movado inter 1936 kaj 1956 kiel prezidanto. Ekde 1957 li redaktis la gazeton *Der Schweizer Abstinente* kaj ekde 1959 estis prezidanto de la Grand-Loĝio IOGT. De 1961 ĝis 1971 li estris la svisajn

bontemplanojn. Krom tio de 1948 li estis membro de la VPOD-sindikato (unuiĝo de la personaro por publikaj servoj), kies sekcio en Horgen/ZH li prezidis.

La liberpensulo lernis Eon en 1952 en Zuriko, gvidis porinfanan Eo-kurson kaj estis membro de la zurika ES, de SES kaj UEA, kies fakdelegito pri kontraŭ-alkoholismo li estis dum 35 jaroj.

Jean BOREL

1868-1946



Post siaj studoj de diversaj sciencoj, precipe historio kaj ĵurnalismo, B. fariĝis publicisto, tradukisto kaj eldonisto.

La neŭŝatela-devena Eo-pioniro fariĝis e-isto en 1901 en Vaumarcus/NE. Li apartenis al la kunfondantoj de SES, kies unua vicprezidanto (1902/03) li estis. En 1903 la honora membro de la neŭŝatela EG forlasis Romandion por iri al Berlino, kie lia iom pli juna frato Jules B. (1873-1947) direktis ekde 1900 la propran presejon kaj eldonejon Möller & Borel GmbH (la postaj nomoj estis Ader & Borel GmbH kaj Ellersiek & Borel). Kiel unu el la komencaj kaj plej fervoraj iniciantoj de la Eo-movado en Germanio, B. kunfondis en 1903 la Eo-eldonejon Möller & Borel en Berlino. Ĉi tiu entrepreno produktis la bezonatan lernmaterialon por la germanlingvaj Eo-studentoj. Presitaj estis i.a. liaj broŝuretoj *Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache mit Übungen, Syntax & Proben aus Poesie & Prosa*, la akompana *Schlüssel zum vollständigen Jahrbuch* kaj *Die Frage einer internationalen Hilfssprache und das Esperanto*, ĉiuj unufoje aperintaj en 1904 en Berlino. Ĉi tiuj influaĵaj libroj estis reeldonitaj en multaj eldonoj kaj grandkvante;

laŭ indiko de *EoeP* (p. 485) la nomita germanlingva lernolibro de Eo estis presita en pli ol cent mil ekzempleroj. Ekde 1904 B. komencis produkti ankaŭ *Esperantistische Mitteilungen*, la organon de la berlina EG (kiun B. kunfondis) kaj antaŭulon de *Germana E-isto*, kies redaktadon B. 1905-28 mem prizorgis. En la eldonejo de B. aperis ankaŭ la granda vortaro de Paul Christaller kaj la kajejoj kadre de la Internacia Eo-Biblioteko.

Kiel ano de la Lingva Komitato ekde 1905, al kiu li estis elektita dum la 1a UK en Boulogne-sur-Mer en 1905, kiun li ĉeestis, B. publikigis artikolojn pri Eo, instruis ĝin kaj tradukis kelkajn verketojn al Eo, uzante la pseŭdonomojn J.B. kaj S. Spero. *EoeP* mencias lin kiel „kulture gravan originalan verkiston de la franca skolo” (p. 141). Li korespondis kun L.L. Zamenhof, kiun li ankaŭ vizitis en Varsovio (pentekosto 1903) kaj kiu vizitis lin en Berlino (julio 1905). En 1911 B. vojaĝis tra Triesto surmare al Grekio kaj la Sankta Lando, pri kio li raportis en *Germana E-isto* (12/1911).

Kiam okaze de bombardado en februaro 1945 la presejo-eldonejo de B., kiu havis pli ol 200 dungitajn laboristojn, estis ruinigita kaj ĝiaj loĝejoj kaj arkivo perditaj, la fratoj revenis al Svislando, kie ili baldaŭ forpasis. Dum Jean restis fraŭlo sen infanoj, lia frato Jules B. estis edzo kaj havis du infanojn.


→Neuchâtel →Bibliografio



Germanlingva broŝuro pri la demando de internacia helplingvo verkita de Jean Borel

Pierre BOVET

1878-1965



B. estis konata romanda sciencisto, pedagogo, eduka reformisto, psikologo, filozofo, religiema moralisto, humanisto, verkisto, ĵurnalisto, redaktoro, eldonisto, organizanto, preleganto kaj mondvojaĝanto, kiu partoprenis en multaj prifakaj konferencoj, ĉefe rilate al edukado.

B. studis klasikan beletron en la universitato de Neuchâtel (1897-98), kie li unuafoje diplomigis; sian duan licencion (pri filozofia literaturo) li faris en la ĝeneva universitato (1900), kie li ankaŭ doktoriĝis (1902). Poste li laboris kiel instruisto pri filozofio en la kantona gimnazio de Neuchâtel (1903-12) kaj kiel ordinara profesoro pri edukaj sciencoj kaj eksperimenta pedagogio en la ĝeneva universitato (de 1919). Kiel direktoro de la Instituto Jean-Jacques Rousseau en Ĝenevo, kiun li fondis en 1912 kaj gvidis ĝis 1944, B. akiris internacian reputacion (la instituto poste transformiĝis en la fakultaton pri psikologio kaj eduksciencoj de la ĝeneva universitato). Post sia emeritiĝo en 1944 B., kiu estis multfoja honora doktoro, retiriĝis al Grandchamp/NE. Fine de sia vivo B. aliĝis al la kvakeroj.

La demando de la neŭtrala universala lingvo ĝenerale kaj Eo aparte trovis gravan lokon en la pedagogiaj kaj edukaj konsideroj de B. Per siaj klopodoj akceli la internacian agnoskon de Eo kiel lingvon en la pedagogio kaj ĝian vastskalan enkondukon en la lernejojn B. faris esencan kontribuon al la svisa kaj internacia Eo-movadoj. Krom la franca, germana, itala kaj angla lingvoj B. aktive uzadis Eon por pedagogiaj celoj, priskribis ĝiajn prope-deŭtikajn avantaĝojn en studoj

kaj prelegoj. Laŭ iniciato de la Instituto J.-J. Rousseau kaj de la Internacia Oficejo pri edukado, kiu estis integra parto de la instituto, kunvokiĝis du signifaj internaciaj konferencoj pri la instruado de Eo en la lernejoj: la unua okazis en 1922 kadre de la sekretario de →Ligo de Nacioj (Palaco Wilson) en Ĝenevo (vd. *Conférence internationale sur l'enseignement de l'espéranto dans les écoles / Internacia Konferenco pri la Instruo de Eo en lernejoj*, versioj en Eo kaj en la franca lingvoj; kaj *L'Espéranto à l'école*, en: *L'Education*). La dua estis organizita en 1927 en Prago (vd. *La paix par l'école / la paco per la lernejo*). En 1925, okaze de la ĝeneva UK, B. iniciatis la Someran Universitaton en Eo, dum kiu prelegis elstaraj sciencistoj, inter ili la psikanalizisto →Charles Baudouin kaj B. mem. Tiam aperis ankaŭ la originalaĵo de lia prifaka studo *Psikanalizo kaj edukado*. En 1948 B. publikigis la *Enketon pri Internacia Helpingvo*. Temis pri fundamenta verko, kies celo estis elmontri, ke por kontentigi sciencistojn kaj lingvistojn gravas ne nur la lingvo mem, sed ankaŭ la spirita, pensa kaj aga kunteksto, konforme al la homarana sinteno laŭ la modelo de L.L. Zamenhof. Okaze de la Zamenhof-jubileo en 1959 B. prelegis en la neŭŝatela porinstruista lernejo pri la kreinto de Eo, kies ideoj tiom forte inspiris la menson de B. La 9an de novembro 1963, dum publika manifestacio de EES en Neuchâtel, B. elpaŝis omaĝe al →Edmond Privat kaj →Charles Ecabert, forpasintaj la antaŭan jaron. Kaj en 1964, kadre de la nacia ekspozicio en Laŭzano, B. paroladis dum la Tago de la paco. Ŝajnas, ke B. bonvenigis reformojn en la lingvo Eo, sed ne aliĝis al Ido. Ĉe Occidental li kritikis, ke ĝi malrespektas la regulan strukturon por atingi pli grandan internaciecon. B., kiu estis membro de UEA, multajn jarojn estis helpata en sia instituto de la sekretario Henriette Ith-Daneil kaj de la pedagogo Alice Descœudres, kiu 1912-47 tie instruis. Ankaŭ la edzino de B., kiu rolis kiel sekretario de B., flue parolis Eon. Same lia filo *Daniel Bovet* (1907-92), farmakologo en Neuchâtel, instruisto en Romo kaj nobelpremiito de 1957, iom konis Eon.

→Instruado de Eo →Ligo de Nacioj
 →Ĝenevo →Gastejo Edmond Privat
 →Bibliografio →Antologio



Karikaturo pri Pierre Bovet

BRASIKFOLIO

Tradicia informilo de la ĝeneva EG La Stelo, kiu aperas ekde 1964. 1964-72 ĝi estis hektografite produktita de *Hans Altherr* (*1914), dua edzo de →*Anita Altherr-Perić* (*1928), kiu multajn jarojn mem redaktis la bultenon. Ekde la duono de la 1970aj jaroj dum longa periodo B. estis prizorgata de →*Madeleine Stakian-Vuille* (1910-2004). En aprilo 1994 la redaktado de B. estis transprenita de →*Andres Bickel*, poste ankaŭ de *Jean Rawyler*, *Louis Vidonne* kaj *Lucien Dahan*, kaj presita ĉe la presejo Pot en Grand-Lancy/GE.

→Ĝenevo →Bibliografio (gazetaro)

La Stelo Genève
Fondita en 1905

Brasikfolio

Majo-junio 2003 — N-roj 5-6 — 39-a jaro

Espéranto-Infos: Tél. 022 740 04 45
 La Stelo: Case postale 188 — CH 1211 Genève 20 — CCP 12-14237-1
 Presas: Imprimerie Pot, Grand-Lancy
 Kotoj por 2003: membroj aktivaj CHF 35.-; paroĵ 45.-;
 junuloj kaj emeritoj 25.-; subtenantoj 20.-; kolektivoj 75.-

August BRAUN

1915-1985



Post siaj studoj de fiziko en la Federacia Politeknika Alternejo (ETH) de Zuriko, B. doktoriĝis en tiam pionira fako pri materioj ludantaj gravan rolon en la duonkondukiloj. Poste li laboris kiel meteorologo ĉe la aviadilejo Dübendorf/ZH, la tiama zurika flughaveno. De 1947/48 lin dungis la Svisa Laboratorio pri horloĝaj esploroj en Neuchâtel kiel fakulon pri metalurgio kaj metal-kunfandado. Paralele li trejniĝis kun horloĝistoj-inĝenieroj studentaj ĉe la neŭŝatela scienca fakultato. B. interesiĝis pri la ellaborado de precizaj optikaj metodoj, kiuj ebligas diferencigi kaj difini la tre nuancitajn kolorojn de lumineskaj substancoj, kiujn oni fiksas sur la ciferplatoj kaj montriloj. B. membris en diversaj fakaj asocioj (Svisa Fizika Societo, Svisa Asocio por material-provado en la tekniko, Franca Metalurgia Societo, Germana Metalurgia Societo k.a.) kaj estis prezidanto de Svisromanda Parapsikologia Asocio. Per siaj teoriaj kaj eksperimentaj esploroj pri mezurado kaj malmoleco de materioj B. fariĝis konata translime en diversaj industrioj. Tra la profesiaj disciplinoj li estis kondukita al filozofio, metafiziko kaj esoterismo; li okupiĝis pri holografio, meteorologio kaj kosmologio, ofte meditadis kaj komparis diversajn religiojn. Li fakis ankaŭ pri muziko kaj mem bone ludis pianon. B. restis ne teoriulo, sed samtempe konkrete agis. Konsciente pri la problemoj de la moderna civilizo, li atentigis pri la danĝeroj rezultantaj el la edukado al aŭtomatigo de la socio kaj el la teknika banaleco. Li sopiris al pli vasta spirita sendependeco profite al pli serena kaj

pli paca mondo. La urno kun la cindro de la denaska turgoviano estis enterigita en la ĝardenoj de KCE (junio 1993), laŭ la deziro de la forpasinto, kiu mortis en Parizo.

B. fariĝis e-isto en 1959 rezulte de prelego de la japana Eo-ĵurnalistino Joŝiko Kaĵino en la Neŭŝatela Geografia Societo. Kompreninte la valoron de Eo por la interkomunikado kaj la kultura pliriĉiĝo, B. tuj adoptis kaj studis ĝin. Kun la deziro, ke la Eo-movado akiru proprajn instituciojn, li inspiriĝis de la sugestoj de →Edmond Privat kaj forte interesiĝis pri la ideo de Eo-universitato, en kiu estu studata ne nur la zamenhofa lingvo mem, sed ankaŭ ĉio en rilato kun la strebado al la unuigo de la homaro. Tiucele en 1968 li troviĝis inter la kunfondantoj de KCE (kaj ties fako IFA) kaj fariĝis ĝia unua prezidanto (ĝis 1984), poste ĝia vicprezidanto, kaj vicrektoro de IFA. De 1974 li planadis kaj efektivigis, kun →René-William Perrenoud kaj →Claude Gacond, la konstruadon de KCE/GEP, unue en La Sagne/NE, kie la oficejo de KCE instaligis en la privata domo de Claude kaj Andrée Gacond, poste en La Chaux-de-Fonds, kie KCE akiris proprajn domojn (→Gastejo Edmond Privat/GEP). B. estis UEA-delegito en Hauterive/NE kaj iam ankaŭ vicprezidanto de SES. En 1986 la KCE-manĝejo de la GEP-domo ĉe la strato Recrêtes 18 ricevis la nomon de August B. (en 1991 tiu domo estis vendita al la lernejo La Grande Ourse).

→Kultura Centro Esperantista →Neuchâtel

Sonja BRUN

*1930. Loĝas en Rotkreuz ZG



Post la bazaj lernejoj en Horw/LU, duagrada lernejo en Lucerno kaj komerca lernejo en

Lucerno (1946-49) B. fariĝis lingvo-instruistino, poste ŝi laboris kiel komerca sekretariino.

B. e-istiĝis en 1946 en Lucerno pere de Johann Mohr kaj Josef R. Koch. En 1957 ŝi trapasis la superan diplomon por instrui Eon. Movade plej aktiva ŝi estis en Lucerno (1946-50), en Bazelo (1957-62), Bristol (Britio, 1962-74), en Bruselo (Belgio, 1974-80) kaj de 1987 denove en Svislando. En 1958 ŝi apartenis al la fondaj membroj de EES, kies unua sekretariino ŝi estis. Kun sia tiama edzo, la konata brita e-isto John Catling, B. faris komunajn Eo-agadojn (1960-86). Post multjara restado en eksterlando ŝi revenis al Svislando kaj ekloĝis en Rotkreuz/ZG. Kiel svisa ĉefdelegito de UEA (1993-2002), komitatanino de LF-koop (1997-2003) aŭ prezidantino de KCE (2000-3) ŝi ĉiam kompetente kunlaboris en la movado.


→Lucerno →Bazelo →KCE



Sonja Brun kun Hans Kürsteiner

David BUHLMANN

*1933. Loĝas en Prilly VD



Emerita ceramikisto-muldisto. Iama aktiva skolto kaj funkciulo de la →Civilservo Internacia, vegetarano. Laŭ propra klarigo B. fariĝis e-isto sub la influo de la politikaj krizoj en Hungario kaj ĉe la Suez Kanalo (1956) kaj pere de →Claude Gaond kaj →Lilly Schaerer. Sekve li vigle agadis en la movado, okupante multajn gravajn oficojn: li estis vicprezidanto de EJS (1957-62), prezidanto de SES (1965-66 kaj en 1976), komitatano de SES (1967-73) kaj ĝia komisiito por romanda Svislando (1982). En la 1960-70aj jaroj li fidele kunlaboris en la laŭzana ES kiel protokolanto, vicprezidanto kaj prezidanto kaj poste ankoraŭ kiel sekretario (ĝis 1992), pro kio la loka societo nomis lin honora membro. Komence de la 70aj jaroj li estis ankaŭ prezidanto de la ĝeneva EG La Stelo kaj ĝia komitatano. Siatempe B. aktivis en EES, estis vicprezidanto, sekretario kaj financa direktoro de Kooperativo de →Literatura Foiro. En 2003, post dudek rekordaj jaroj da komitataneco en LF-koop, B. retiriĝis, sed daŭre restis je la dispono kiel revizoro. En la 90aj jaroj B. kunlaboris ankaŭ kun KCE kiel vicprezidanto, prezidanto, sekretario kaj protokolanto (en 2003 li forlasis la komitaton de KCE). Nelaste li estis delegito de SAT kaj peranto de *SAT-Amikaro*, kunlaborinto de *SER*, *Transalpa E-isto* kaj *Lozana Informilo* kaj redaktinto de la svisa SAT-organo *La Semanto* (ĉ. 1967). En 2003 B. kunlaboris en la 76-a SAT-kongreso en La Chaux-de-Fonds kiel membro de ĝia organiza komitato. Kiel UEA-delegito kaj membro de SAEF B. daŭre estas ligita kun la Eo-movado.

→Vaŭdo →SES →KCE →Literatura Foiro